

*Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503
dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana*

*Shoqata Esperantiste Shqiptare është e njohur ligjërishit sipas
vendimit nr 3503 datë 15/02/2013 të Gjykatës së Tiranës*



Retpaĝo- Faĝa në internet: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ www.esperanto.net/al

Diskutlisto- lista e diskutimit në internet:
albanajesperantistoj@yahoo.com

Adreso de redaksio: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio
(00355682580758; bselimi@gmail.com)

Aktivuloj

Prezidanto

Shaban Hasani, Tirane (00355682080677, shabanhasani@gmail.com);

Fakdelegito

Gjergji Gusho, Pogradec,(00355673860228 gjergji_gusho@yahoo.com),

Fakdelegito

Agim Peraj, Lezhe, (355694472430, agimperaj@yahoo.it);

Fakdelegito, kasisto

Martha Otto, Vlorë, (00355697946646, martha.otto@gmail.com)

Sajmir Beqiraj, Tirane, Shkoder, (00355684030613, s_beqiraj@yahoo.com);

Fakdelegito

Nehat Sokoli , Kukes,(++355682587699, nehatsokoli@yahoo.com);

Fakdelegito

Engjell Gusho, Korce, (00355692350111, engjellgusho@yahoo.com),

Fakdelegito

Rita Permeti, Tirane (0035542363 360; 00355686857800 ritapermeti@yahoo.com);

Fakdelegito

Luan Jaupi, Durres, (00355675567184, luanjaupi2014@gmail.com)

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO - INSTITUTO

Buletini i Institutit Shqiptar të Esperantos

Nr. 139, aŭgusto-septembro (gushtt-shtator) 2018

Albanaj proverboj

Lumturia e njerëzve është në duart e grave- La feliĉo de homoj estas en la manoj de virinoj

Lumturia e kombit varet nga edukimi i femrës së tij- La feliĉo de nacio dependas de edukeco de siaj virinoj

Bli sa të duash dhurata, po nuk të desh gruaja, do të marrë një tjetër- *Vi povas aĉeti kiom ajn da donacaĵoj, sed se via edzino ne amas vin, ŝi rigardos aliulon.*

Kush ia tregon të gjitha gruas, është martuar për një kohë të shkurtër- *Kiu konfesas ĉion al sia edzino, ties geedzeco estas ne longdaŭra*

Të gjitha janë vajza të mira, po nga dalin këto gra të këqija?- *Ĉiuj estas bonaj knabinoj, do de kie venas malbonaj virinoj*

Kush ka gruan të hijshme duhet të ketë më shumë se dy sy- *Kiu havas ĉarman edzinon, devas havis duoble da okuloj*

Po të tha gruaja të hidhesh nga shkëmbi, lut zotin të jetë shkëmb i ulët- *Se via edzino postulas de vi fali de ŝtonego, preĝu ke la ŝtonego estu malalta*

ENHAVO

Ni kaj UEA, ILEI kaj AIS

Fermo de UK-Lisbono

SvisRaporto pri UK

Lingvo esplora projekto

Esperantologio en Pollando

Mesaĝo de UNESCO al UK-Lisbono

EKO-2018-21

Gazetara komuniko

Instruado

Videokursoj de Madrogoa

Esperanto en bildoj

Niaj leteroj

Vasil Kadifeli-Turkio

Stefan Keller- Germanio

Martha Otto- Albanio

Alex Mazzetti- Italio

Trude Sinno- Germanio

Sergeo Domrach- Rusio

Alexandre Miguel Carniero- Brazilo

Josenilton- Brazilo

Honore Sebuoro- Kongo

David Roman- Katalunio, Hispanio

Filipo kaj Julia- Italio

Bardhyl Selimi- Albanio

Julia Sigmonf- Rumanio, Italio

Nicole Margot- Svisio

Hector Alois Font- Hispanio

Templo de Bona Volo- Brazilo

Anatolij Ionisov- Uzbekio

Julia Timar- Hungario

Niaj amikoj

Biciklado tra Albanio

Jacques Tuinder

Zamir Gjurgji

Informaĵoj

Verkoj - Amir kaj Eldad

Kontakto-nova numero

Memorialo- Internacia konkurso

Premio Pirlot

Artikoloj

Scienco, Historio kaj Spiriteco

Ne estas estonteco sen junuloj

Intervjuo kun diktatoro

50 jarojn post invado de Ĉeĥoslovakio

Artikoloj el Almanako Lorenz 2018

Beletraĵoj

Ĉerpaĵoj el Turka Stelo

Skribaĵoj el Kroatio

Poeziaĵoj de Mimoza Ahmeti

Nova libro de Julia Sigmond- "Dankon"

Poezioj de Mimoza Ahmeti

Nia kaj UEA, ILEI kaj AIS

- UK-Lisbono

Fermo de UK 103 Lisbono





Sinjorino Martha Otto, nia delegito, kun UK delegitoj, inter kiuj ankaŭ s-r- Lee Junk Kee



Martha kun esperantistino Vera



Martha kun sinjoro Erich Dieter Krause, esperantisto, germana filologo

• **SvisRaporto prezentas la 103-an Universalan Kongreson de Esperanto filme**
Jen ĵus aperis la filmo pri la Solena Fermo de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto en
Lisbono:

<https://www.youtube.com/watch?v=noThhyavQ38>


Adiaŭ Lisbono, Portugalio, kaj ĝis revido en Lahtio, Finnlando!

- Invito por partopreni lingvo-esploran projekton

UEA konsentis diskonigi informon pri neesperantista lingvo-esplora projekto, aplikanta Esperanton. Pardonpeton, se vi ne la unuan fojon ricevas la informon kaj eble jam aliĝis al la projekto: estas bezonataj pliaj partoprenantoj!

Oni ne rajtas partopreni ankoraŭfoje, sed jamaj partoprenintoj kaj same esperantistoj, kiuj ne povus aŭ ne ŝatus partopreni pro teknikaj kondiĉoj aŭ aliaj kialoj, estas petataj informi pri la projekto al siaj E-konatoj, kiuj povus interesiĝi.

Aktivuloj de landaj kaj lokaj E-movadoj estas petataj plusendi la inviton al landaj kaj lokaj movadaj retlistoj kaj E-grupoj en sociaj retoj.



- **La invitletero de Lionbridge Global Services For Machine Intelligence:**

Ni daŭrigas lingvo-esploran projekton, kaj por ĝi ni serĉas Esperanto-parolantojn en tre bona kaj perfekta niveloj. Ni esperas, ke vi povus helpi nin trovi kandidatojn kun tia scio de Esperanto. Ni tre ŝatus vian partoprenon en ĉi tiu projekto, kaj ni instigas vin dividi ĝin kun viaj samklubanoj/samasocioj, amikoj kaj familianoj, kiuj ankaŭ parolas E-on en alta nivelo.

La celo de la lingvo-esplora projekto estas helpi disvolvi parolad-rekonan teknologion por Esperanto.

La tasko, kiun vi devos plenumi, estas simpla kaj ne postulas specialajn sciojn aŭ antaŭan sperton. Vi vidos frazojn aŭ partojn de frazoj en Esperanto kaj devos registri vian voĉon dum vi legas ilin laŭte.

La nepra kondiĉo estas, ke vi estu flua parolanto de Esperanto. La partoprenantoj povas loĝi ie ajn en la mondo, la taskoj povas esti faritaj hejme. Vi bezonos havi Android-telefonon aŭ Android-tabuleton/platkomputilon. Alternative, vi ankaŭ povas uzi ajnan komputilon kun retumilo Chrome, aldone bezonatas mikrofono, interreta konekto kaj kvieta ĉambro por fari viajn registraĵojn.

Bedaŭrinde, tio ankaŭ signifas ke vi ne povos kompletigi nian taskon per iOS-aparato.

Ĉi tie estas la detaloj de la projekto, kiuj helpas komenci:

- Vi devas havi 18 jarojn aŭ pli;
- La daŭro de la tasko estas ĉ. 2 horoj;
- Pago: 80 USD post plenumo de la tuta tasko. La pago estos ĝirata per PayPal aŭ rekte al la banka konto per XendPay.

Por partopreni vi nepre bezonas plenigi la aliĝilon

ĉe: <https://fs30.formsite.com/LB2014/form264/index.html>

Post taksado de via aliĝilo, nia teamo de produktado kontaktos vin kun pliaj detaloj kaj instrukcioj (atentu ke la letero ne pereu en spam-dosierujo).

Se vi volas ekscii pli multe pri Lionbridge kaj kion ni faras en Lionbridge GSMI, vi povas legi nian paĝaron ĉe: <https://www.lionbridge.com/en-us/global-services-for-machine-intelligence>

- Konsiloj de la UEA-respondeculo:

la fragmentoj de E-lingvaj tekstoj, kiujn necesas laŭtlegi, ofte estas apartigitaj tiel, ke la rezulto estas gramatike ne interligita kaj havas strangan sencon. Ne necesas tion korekti dum la legado: ĉar oni instruas komputilan programon rekoni parolatan lingvon, do, bonvolu prononci tiel, kiel estas skribite.

La programo, per kiu oni plenumas la taskojn, havas anglalingvan interfacon. Tre baze: oni klakas la grandan butonon por (1) komenci kaj por (2) fini la sonregistradon de ĉiu frazo.

Ne estas projekto de UEA. Tamen se vi dezirus ricevi plian klarigon, bonvolu senhezite kontakti min per la retadreso reto@uea.org.

- Jen la listo de la ĝisnunaj SvisRaporto-filmoj pri la 103-a UK:
Solena Fermo: <https://www.youtube.com/watch?v=noThhyavQ38>

6-a Kongrestago: <https://www.youtube.com/watch?v=ZyMlo-gEODY>

5-a Kongrestago: <https://www.youtube.com/watch?v=WVII15qFmdw>

4-a Kongrestago: <https://www.youtube.com/watch?v=YoNzcb897WM&t=48s>

3-a Kongrestago: <https://www.youtube.com/watch?v=Y4BdsqDgohI&t=135s>

Alveno kaj malferma tago: <https://www.youtube.com/watch?v=ĉ94QaLDvEA&t=68s>

Kanalo SvisRaporto: <https://www.youtube.com/channel/UC2Av8SQXyy0eSzBgnMHmlkg>)

Spektu la filmojn de la reĝisorino Nelida Weidmann, abonu la kanalon SvisRaporto, subtenu ŝian laboron klakante sur la suprenmontrantan dikfingron kaj dissendu la ligilon al la kanalo kaj al la filmoj al ĉiuj viaj geamikoj kaj kopiu ĝin en viaj retejoj.

Kun amikaj salutoj

Dietrich Michael Weidmann

Archstr. 2, PF 26, 8613 Uster 3, Svislando

<http://informejo.com>

- Ilona Koutny prelegas pri la spertoj en UAM rilate al la "Universitata instruado de Esperanto kaj Esperantologio", La prelego okazis kadre de la Simpozio de ILEI, kiu, en kunlaboro kun UNED kaj Hispana Esperanto-Federacio, okazis en Madrido en 2018.
<https://youtu.be/U2gbboE9tdQ>

- La mesagho de la Ghen.Dir. de Unesko, s-ino Audrey AZULAY, sendita al nia 103a UK en Lisbono, estas plia bonega atingo - fakte daŭrigo de la 'tradicio' jam 'plenumita' de/kun Irina Bokova (antaŭa Ghen.Dir. de Unesko) diversokaze! Nun estas nia tasko vaste, en laŭeble plej multaj lingvoj, *EKSTER nia movado diskonigi ghin!*

Tiaj mesaghoj, faktoj pri rekono, subteno (ghuste fare de Unesko kaj de aliaj UN-nivelaj instancoj) - despli en la momento de la ekapero de la Unesko-Kuriero en esperanto (!) - estas bonegaj pruviloj al la publiko (UN/Unesko-aj, shtataj, kaj chiunivelaj) pri tio, ke nia movado, Esperanto, UEA kaj nia laboro ja estas agnoskitaj, traktataj de la altnivelaj instancoj kiel gravaj kontribuoj, 'elementoj' en la monda kunvivado, klopodoj por paca futuro, kun respekto al la lingvo kaj kulturo de chiuj popoloj.

Tial gravus rapide vaste publikigi, diskonigi nun tiun mesaghon, levi nian prestighon en la okuloj de dubantoj, ignorantoj pri chio tio. Plia briko en nia agado cele al sukceso pri altnivela agnosko kaj oficiala enkonduko, pli kaj pli vasta uzo de Esperanto. Sed almenau, ech se ni atingas 'nur' tion per tiaj okazajhoj, faktoj, ke nia prestigho iom altighas en la okuloj de ekstermovadanoj, niaj konversacipartneroj, jam tio estus gajno de iomo el chio tio.

Jam staras en la suba [retpagho](#) la mesagho de Irina Bokova, sendita al la 96a UK:

http://www.linguistic-rights.org/unesco/unesko.html#UNESCO_96aUK

kaj la en-kongresa parolado de la UN-reprezentantino (en la sama Kopenhaga UK), s-ino Pernille Fenger, UNFPA:

<http://www.linguistic-rights.org/un/un.html#PFUNFPA>

(ankau video baldau aperos pri tio).

- Kaj tie estas la franca originalo kaj la unuaj tradukversioj (je 2018aug27) de la Unesko-mesagho al la 103a UK:

** eo - Esperanto (Lingvo Internacia)

Mesaĝo de s-ino Audrey AZOULAY, Ĝenerala Direktorino de UNESKO (UNESCO), okaze de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), Lisbono, 29-a de julio 2018 -

<https://goo.gl/z6nuUB>

- la diskonigenda paghligo estas:

<http://www.linguistic-rights.org/unesco/>

(au la (pli longa) rekta ligo al la enpagha loko de tiuj lingvoversioj de la mesagho:

http://www.linguistic-rights.org/unesco/unesko.html#UNESCO_103aUK

sed ja ghi estas facile videbla, la unua temo/artikolo desupre en [la pagho](#).)

Uzu chi tiun ligon en reago al artikoloj, en viaj retejo, blogoj, FB-pagho, gazetara komuniko, ktp.

! Se vi akceptus traduki la tekston en vian lingvon (ne jam ekzistanta versio), bv. skribi vian intencon al la adreso:

traduko por lingvaj rajtoj <traduko(che)[linguistic-rights.org](http://www.linguistic-rights.org)>

Por via traduklaboro vi povas uzi la word-an version de la franca originalo au de la esperanta versio:

malfermite la koncernan pdf-n, vi povas havi ties Word.doĉ version anstatauante la finajhon de la longa pdf-adreso:

".....pdf"

per

".....doĉ"

Tiujn wordajn versiojn eblas facile kopii kaj englui en viajn retejojn, blogojn, FB (vizaglibro), ktp. Bonas aperigi la kompletan mesaghon en retejoj, ĉar tiam guglo rimarkas ĝin pli rapide/facile pro la rilataj shlosilvortoj enhavataj en ĝi (UNESCO, AZULAY, ESPERANTO, ktp!).

Sed ĉiam aldonu kaj abunde uzu, diskonigu tiun ligon en komentoj al priesperantaj artikoloj:

<http://www.linguistic-rights.org/unesco/>

au la rektan al la loko en tiu pagho, al la *Azulay/Unesko-mesagho*,

http://www.linguistic-rights.org/unesco/unesco.html#UNESCO_103aUK

kiu ja meritas grandan atenton kaj diskonigon!

Antaŭdankante por via valora kunlaboro!

[Stefano Keller](#)

- *Estrara Komunikado EKO 2018-21 sendita el Budapeŝto, la 11an de septembro.*
AMO-UA okazos post la unuaj AMO-RO

Post la jubilea 50a AMO-seminario okazinta kadre de la 103a Universala Kongreso, sekvas du pliaj deciditaj AMO-seminarioj ĝis la jarfino. AMO 51 signalas la unuan seminarion en Rumanio. Ĝi okazos dum unu mateno kadre de la Nacia Kongreso de la landa asocio de UEA, Esperanto-Asocio de Rumanio (EAR). Ĝi identos kun novspeca programo por tiu lando: Kleriga Duontago. La modelo ne estas precize la similnoma UK-programo, ĉar kontribuado estas aktive serĉata de iu ajn kongresano, ankaŭ plene novaj membroj – ekzemple tiuj allogitaj post fino de la kurso en Duolingo. AMO-50 sekve okazos tra kvar horoj en la mateno dedimanĉo, la 16an de septembro.

1. Stefan MacGill (Hungario) - AMO, la projekto 'sprunteamoj', la nova kotizsistemo.
2. Stier Gabriela (Satu Mare) – Poŝtkruciĝo,
3. Mariana Berariu (Gherla) – Interesaj faktoj pri Rumanio
4. Cătălin Văduva (București) – Interreta Eo-kurso rumanlingve kaj la retpaĝaro de la asocio
5. Aurora Bute (Timișoara) – E-kongresoj – fenestroj al la mondo
6. Bodale (Suceava) - Kion mi povas fari por Esperanto en Rumanio
Paŭzo 15 min.
7. Oldřich FISCHER (Ĉeĥio) – Libeloj
8. Adriana Dolca (Timișoara) - La reĝo Karolo la Unua
9. Mihaela Dolca (Timișoara) - La muta malapero de la insektoj
10. Mihai Trifoi (Bixad) - Pri la rumana popola kulturo
11. Birta Alexandru (Satu Mare) - Kelkaj novaĵoj pri la transplantado de homaj organoj
12. Doina Popa (Timișoara) – Fado, la portugala trezoro.

Videblas, ke ne temas rekte pri trejnado, sed la programo valoras por konstati, kiel eblas uzi Esperanton por klerigado, kaj kiel meĥanismo por doni voĉojn al novaj esperantistoj.

La 52a AMO-seminario portos la programon al plia nova lando en la regiono: Ukrainio. Tio okazos inter la 19 kaj la 21a de oktobro en la renoma urbo Lviv kun la temo “Mpvada Fortigo en Sud-Orienta Eŭropo.

- **UMEA vidigas sin inter kuracistoj**

Aperis sufiĉe ampleksa artikolo en angla lingvo pri UMEA en la World Medical Journal, revuo de la monda medicina asocio WMA:

<https://lab.arstubi.driba.lv/WMJ/vol64/august-2018/#page=32>

Ni sukcesis samtempe ekspliki Esperanton, menci la meritojn de UEA kaj la UNESKO-rezolucion de Montevideo, Amikumu, kaj varbi por la Medicina Internacia Revuo.

Kompreneble raporto pri faka medicina agado en Esperantujo havas perfektan lokon en la revuo de la Monda Medicina Asocio, WMA.

- **EKO maloftiĝos**

Kiel vi jam konstatis, la EKO-komunikoj aperas malpli intense. Unuaflioj en kvar jaroj ne aperis komunikoj el la Universala Kongreso. Ŝanĝoj en la programaro uzata por la pretigo enkondukis “bonigojn”, kiuj nete malhelpas – kredeble sekve de la novaj reguloj de EEU. Feliĉe la ofteco de Gazetaraj Komunikoj intensiĝas – kaj ajna persono rajtas peti al la CO por esti aldonita al la sendolisto.

Ni bedaŭras – sed jen la realeco.

Stefan MacGill

- **La Ligo vivas kaj progresas**

Gazetara Komunikado 2018-08-12

Jen prezento de la ĉefaj faktoj de nia 51-a Kongreso en Madrido.

Aliĝis 256 personoj. Tio estas rekordo por la ĉiujara grava evento de la Ligo.

La Komitato elektis du novajn Honorajn Membrojn. Temas pri Profesoro Ronald Glossop kaj Profesoro Duncan Charters, ambaŭ el Usono.

La Komitato akceptis du novajn sekciojn : unu en Senegal, unu en Armenio. Per tiu paŝo ILEI nun havas 43 sekciojn.

La Komitato danke akceptis la demision de Profesorino GONG Xiaofeng « Arko », kiu deĵoris kiel vic-prezidanto en la Estraro dum 6 jaroj. La Komitato reelektis la kvin kandidatiĝantajn membrojn kaj alelektis du novajn personojn. Konsekvence la Estraro konsistas ekde nun por tri jaroj el (laŭ alfabeto ordo)

Karine Arakeljan, Armenio, nova estraranino.

Ivan Colling, Brazilo

Mireille Grosjean, Svislando, prezidanto

William Harris, Usono, kasisto.

Elena Nadikova, Rusio, sekretario

Radojica Petrovic, Serbio

Yuko JUNG « Unika », Koreio-Japanio, nova estraranino.

La taskodivido inter la estraranoj ne ankoraŭ okazis. Oni povas rimarki, ke la Estraro konsistas el kvar virinoj kaj tri viroj. Okaze de la tuta Kongreso kaj dum la konkluda parto la partoprenantoj povis esprimi sin, proponi novajn ideojn, diri dezirojn. La estraro multon notis kaj pritaksos tiujn

sugestojn. Substrekindas, ke diversaj personoj ne nur proponis ion, sed ankaŭ proponis mem transpreni la taskon. Do la pozitiva etoso en la Ligo altiras kunlaboremulojn. La Komitato aprobis ĉiujn raportojn kaj malŝarĝis la Estraron.

La Kongreso komenciĝis per du komunaj tagoj kun la tuthispana Kongreso de la Hispana Esperanto-Federacio. Ĝi finiĝis per simpozio pri la kongresa temo : la kultura heredaĵo de Esperanto. Partoprenis en tiu simpozio diversaj esperantistaj profesoroj kaj unu profesorino de la Universitato por ne ĉeesta instruado UNED. Komprenoble la urbo Madrido, grava eŭropa ĉefurbo, altiris multajn partoprenantojn el entute 33 landoj, kiuj volis malkovri la kulturajn trezorojn de tiu urbego. Parkoj, muzeoj, preĝejoj, monumentoj ne mankas en Madrido. Ne eblas menciigi ĉiujn restoraciojn, kie la kongresanoj povis malkovri la hispanan gastronomion.

Inter la programeroj de tiu Kongreso oni povas menciigi la frandvesperon, kiu okazis ekstere kun koncerto de la grupo Kaj Tiel Plu ; Lingvan Festivalon, AMO-seminaron, diversajn lingvokursojn, lertigadon de instruistoj EIT sub la gvidado de D-ino Katalin Kovats, koncertojn de Kaito, nacian vesperon, internacian vesperon, dudekon da diversaj prelegoj kaj multajn interesajn ekskursojn.

Raportas Mireille Grosjean

Instruado

VIDEOKURSO DE ESPERANTO - LA 3-A LECIONO (ADJEKTIVAJ)

https://www.youtube.com/watch?v=D0e_eeaqvcc

https://www.youtube.com/watch?v=rze_zgLOp4I

Prepozicioj

<https://www.youtube.com/watch?v=rFDz1S8Nv8>

<http://jotakaeme.blogspot.com/2018/08/esperanto.html>

Mi petas al vi, ke, se eble, vi skribu en via nacia lingvo (se ĝi ne estas la portugala) la suban tekston en la komentejo de la video:

REKOMENDOJ:

1) Ripet(ig)i la studon ĉiutage; **Përsërite mësimin ĉdo ditë**

2) En la unua tago nur spekt(ig)i la videon, por koni la strukturon de la leciono kaj la respondojn; **Ditën e parë vetëm shihe vidion për të njohur strukturën e mësimit dhe përgjigjet.**

3) Paŭz(ig)i la videon inter ĉiu demando kaj respondo, por provi respondi mem, preferinde ĉiam laŭtvoĉe. **Ndale vidion ndërmjet ĉdo pyetje për të provuar të përgjigjesh vetë, më mirë me zë të lartë.**

PERIODECO DE LA VIDEOJ: **Periudhat e vidiove**

Ĉiun 15-a tagon. **Ĉdo 15 ditë**


Por ricevi la lecionon per PDF, sendu retmesaĝon al jotakaeme@gmail.com Për ta marrë mèsimin në PDF dërĝo mesazh në adresën jotakaeme@gmail.com

Por volontuli kiel voĉparolanto, prezentiĝu per la sama retadreso.

Për të shërbyer si vullnetar si folës me zë, paraqitur te e njëjta adresë

Madragoa


- **Esperanto en bildoj**



Ŝarĝaŭto

transportoj





kapo

haroj

orelo

okulo

nazo

vango

gorgo

kolo

buŝo kaj lipoj

brako

brusto

dorso

ventro

kubuto


mano

fingroj

kuro

piedo

kalkano



ĈE TENDARFAJRO

1. fiŝaĵo
2. viando
3. kolbaso
4. limonado
5. avokado
6. terpomo
7. fungo
8. nudeloj
9. biero
10. vino


Lingolia
SIMPLE PLIBONIĜU EN LINGVOJ
Esperanto Grammar and Vocabulary
Start learning online now with explanations in English:

WWW.LINGOLIA.COM

Septembro 2018

35							36							37							38							39													
Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ĵa	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ĵa	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ĵa	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ĵa	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ĵa	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ĵa	Ve
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30												

- Internacia Esperanto Instituto aperigis jenan mapon de naciaj flagoj kie enestas ankaŭ tiuj de Albanio kaj Kosovo



Leteroj

(Por la Bulteno 138)

- Dankon, Amike, Vasil Kadifeli
- Dankon Bardhyl! Amike, Stefano



- Heide Martha Otto

Kara , koran dankon por la nova bulteno kaj via aparta artikolo. La UK estas rava evento denove kun 1500 Esperantistoj el 75 landoj kaj multege da interesaj programeroj. Baldaŭ mi sendos fotojn, kun koraj salutoj, martha

- Kara,
dankon pro sendi vian bultenon, tamen mi ne plu estas interesita pri Esperanto, do bonvolu forigi la adreson "info@nodobandiera.it" el via listo.



Korajn salutojn, Alex Mazzetti

- Kara, dankon pro viaj interesaj kontribuajoj. Ĉu vi ĉion jam legis? Bedaŭrinde mi nur mallonge trafolumis ĉion kaj vidis ke Martha bone alvenis en Lisboa. Ĉi-tie preskaŭ neniu scias pri Skanderbeg. Valoras sendi mallongigitan prezentadon de tiu libro al UEA por kontribuajo en la gazeto "Esperanto", ĉu ne?
Ĝis morgaŭ mia filo kun familio gastas ĉe mi. La 3 filinoj, 6–10, estas treege viglaj, mia pacienco grandega, sed mi antaŭĝojas la venontajn trankvilajn tagojn.
Dankon pro ĉio ka ĝis iam ie!
Kore, Trude Sinno

• Kara, koran dankon al Vi pri ĉio sendita de Vi. estas tre multa kaj tre interesa materialo, mi ĵus rigardis nur iom(ete), pli poste mi tralegu ĉion. nun mi havas laboron en mia ĝardeno, kaj post emeritiĝo-pensiuliĝo, ni ambaŭ: mi vintre kaj mia edzino julie krom nia ĝardeno ordigas multon en nia hejmo, garaĝo kaj aliajn aferojn kiuj bonege akumuligis al nia pensiul-umado, por kiuj ĉiam mankis tempo dum fervoja laborado kaj preskaŭ forestado en propra hejmo. amike
Sergeo Domrach

- dankon por la bulteno kiel vi fartas? **PROF. ALEXANDRE MIGUEL CARNEIRO**
Whatszap/Fone 981554049
- Nome de mia tuta skipo, mi gratulas la skipon de ALBANA ESPERANTO - INSTITUTO pro la tre utila, informriĉa kaj didaktika bulteno!, Joseniltono
- Kara amiko;
Dankon pro via mesagho pri vi! Chu vi fartas bone? Mi sciigas vin ke mi kaj mia brazila, franca amiko cerbumis krei turisman projekton por ke aktivu kaj disvastigu esperanto tra tiu temo. Tamen, ni bezonas verajn virojn ; kiuj povas aktivigi la turisman movadon; tiuj kiuj povas intershanghi diversajn maturajn ideojn. Mi revarbas aktivulojn teme de turisma agado. Nia celo estas disvastigi esperanton tra turismo. Mi pensas, tio estus bona ideo. Chu ne? Kiel tasko: se vi tre interesigh pri tiu nova turisma projekto, bonvolu doni al mi viajn datumojn kaj interesu aliajn viajn geamikojn tutmondajn.
Atendante viajn reagojn! Plej amike E-Instruisto Honore Sebuoro
- Saluton! Mi nomiĝas David, mi estas 47 jara esperantisto el Barcelono, Katalunio. Mi vizitos Albanio dum la venonta septembro. Mi vojaĝos bicikle ĉirkaŭ via lando. Plaĉos al mi renkonti iun Albanajn esperantistojn. Se iu el la Albana Esperanto Asocio deziras renkontiĝi, skribu min aŭ voku min telefone kaj eble ni povus havi rendevuon. Dankon!

Se ne estas iu ŝanĝo, venontan merkredon mi alvenos al la haveno Durres. Tiam mi ekkomencos bicikli tra Albanio (post legado de via informo mi ŝanĝos iomete mian rondvojon. Dum la boatvojaĝo mi komplete difinis rondon kaj kio kaj kie kaj kiam mi vizitos). Mi vizitos Tirana eble komence, eble antaŭ reiri Durres por preni la boaton denove por reiri hejmen.

En Albanaj esperantistaj retpaĝoj mi trovis kontaktojn pri aliaj esperantistoj el diversaj urboj. Ĉu ili estas ankoraŭ validaj kontaktoj? Dankon!

- Bone kara, vi alvenos en Durres merkrede. Kiam vi estos en Tirana, ĉu morgaŭon? Ĝis Bardhyl
- Ĝentila S.ro, ni gratulas al la albanaj popolo kaj estraro. La oficiala deklaro de via ministro Ditmir Bushati kortuŝis nin. Ĝi bone spegulas la Esperantan *interna ideo*-n, laŭ kiu Eŭropo devus konduki. Dankon, Filippo-Julia
- Karaj, kortuŝaj estas viaj varmaj vortoj, mi estas tre honorata pro tiuj. Estu bonfartaj! Albanoj kaj iliaj antaŭintoj estis regataj dum 2000 jaroj de fremdaj imperioj (romia, bizanca, otomana) kaj nur 106 jaroj parte (nuna Albanio) estis sendependaj. Sed ilian vivon gvidis kaj reguligis neskriba Konstitucio nomata Kanun el miloj de artikoloj. Unu grava artikolo estis savi fuĝinton eĉ se li estas malamiko.. Tiel hebreoj rifuĝis en nia lando antaŭ kaj dum la Dua Mondmilito. Ilia nombro dudekoblis postmilite kaj neniu hebreo estis mortigita, kvankam dum kvin jaroj la lando estis sub jugo de faŝistoj. Lastajn jaroj pli ok kvar miloj iranaj opozicianoj al nuntempa reĝimo tie trovis azilon en Albanio, kiam ceteraj landoj de EU ne akceptis ilin... Ankoraŭ dankon, amike Bardhyl

- **(Salutmesaĝo de Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktorino de UNESKO, al la UK en Lisbono, 2018)**

Mi ne scias, kiu verkis ghin, sed tiu teksto estas la plej inteligente vortumita de UNESKO, kiun mi ghis nun iam ajn legis.

Ghi evidente aprezas la rolon de Esperanto, sed ghi ankaŭ klare montras la limojn de la funkciado (au rolo) de Esperanto kaj avertas, ke Esperanto ne havas prioritaton por Unesko, sed prioritaton havas la plurlingvismo kaj la neceso konservi malgrandajn lingvojn, kiuj estas minacataj de elmortado, plus kelkaj aliaj gravaj taskoj.

Post iu fazo, en kiu UEA traktis tiajn temojn, ghi intertempe shajnis forlasi ilin por okupighi pri temoj, kiuj interesas nur UEA-n: statutoj, kotizoj, financoj, ekzista estonteco de UEA. Tion certa tipo de e-istoj (kiun oni povas renkonti en la komitato de UEA) ege interesas, dum la supre menciitaj temoj lasas ilin grandparte indiferentaj.

En la teksto ekzistas kelkaj eroj, kiuj povas konduki al miskomprenoj:

1e: La tasko kaj celaro de la Esperanto-movado ne estas konservi au savi malgrandajn lingvojn, kiuj estas minacataj de la elmortado.

2e: La tasko kaj celo de Esperanto ne estas helpi al la plurlingvismo, sed al la disvastigo de Esperanto. La tasko de la Eo-movado ankaŭ ne estas defendi la lingvan diversecon kaj kuraĝigi al plurlingva edukado. Tiuj taskoj koaj celoj ne konformas al kaj ne kongruas kun la kernaj kompetencoj de la Eo-movado. Do, la Eo-movado povas senti sin ne koncernata de tiaj temoj. Tio ne signifas, ke la Eo-movado ne okupighu aŭ ne povus okupighi ankaŭ pri tiaj temoj, sed al ghi simple mankas la kapacito, la rimedoj, la kompetencoj kaj kompetentecoj, la influo kaj la interesigo por atingi ion ajn sur tiuj kampoj.

3e: Estas strange, ke oni ekscplacite mencias, ke Esperanto ne volas forviŝi la grandan kvanton da parolataj lingvoj en la mondo, kvazaŭ che UNESKO ekzistus la opinio, ke Esperanto celas fari ghuste tion. Kompreneble, la sekreta celo de la Eo-movado estas, ke Esperanto venku en la mondo kiel neutrala universala lingvo. Chu ghi vere celas forviŝi la grandan kvanton da parolataj lingvoj estas demando ambivalenta, pri kiu la Eo-movado devus konfirmi sian definitivan vidpunkton.

Do, rilate la originajn intencojn de la Esperanto-movado, kiuj validas ghis nun, la mesagho de la ĝenerala direktorino de UNESKO maltrafas la esencon de la aferoj.

Entute, oni do povas interpreti la tekston kiel rifuzon de Esperanto fare de UNESKO laŭ la praelisma ideo de la Esperanto-movado. La firma deziro aŭ espero, ke Esperanto disvastighu tra la mondo kaj farighu universala lingvo, ne estas indikita flanke de UNESKO. Instrui Esperanton kaj dividi komunajn valorojn jes, sed ne pli. Alivorte: UNESKO subtenas la *instruadon* de Esperanto, nenion alian (krom eble ankoraŭ la eldono de la *UNESKO-Kuriero*, sed chu ghi daŭre aperos ne estas klare), se la Esperanto-movado partoprenas la menciitan agadon de UNESKO. Sed la menciitan agadon, kiun UNESKO postulas de la Esperanto-movado, la Esperanto-movado ne povos kaj ne volos plenumi. Do, kredi, ke UNESKO subtenas Esperanton (laŭ la praelismo) estas iluzio. Rilate la UNESKO la Esperanto-movado trovighas en dilemo.

Sed la instruado de Esperanto, kiu esence dependas de du maljunaj hungarinoj plus eble de iuj (nekonataj) amatoraj volontuloj, trovighas tutmonde en mizera situacio. Maksimume kelkdek personoj partoprenas en iuj oficialaj Esperanto-kursoj, kaj partoprenantoj en tiaj kursoj ofte baldaŭ forlasas ilin kaj tiel neniam atingas pli altan nivelon ol tian de komencantoj (la plej bonaj, lertaj, entuziasmaj kaj aktivaj e-istoj estas memlernintoj). La tuta agado de ILEI konsistas el nuraj shaumo kaj fumo kaj oni devas timi, ke la balono, kiu estas plenplena de varma aero, baldaŭ krevos, same kiel AIS (kiu disdonas de neniu agnoskitajn premiojn kaj diplomojn al siaj kunludantoj) kaj chiuj aliaj similaj ĥimeroj, je kiuj la espero de la Esperanto-movado dependas (kaj suferas aŭ malsanas), kvankam ilia signifo en la ekstera mondo estas nula.

Chu Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktorino de UNESKO, estas informata pri la problemoj kaj la reala situacio de la Esperanto-movado, ne estas konate. Kiel kutime, la (daŭre tre influa) propagando de UEA evitas mencii ĉiuspecajn problemojn de la Esperanto-movado, tiel ke la (ekstera) publiko estas trompata kaj ne konscias pri la vera stato de la Esperanto-movado, ricevante en la gazetaro nur nekompletajn informojn pri Eo. Dum UNESKO certe havas aliajn prioritatojn, celojn kaj taskojn ol subteni Esperanton, ĝhiaj membroshtatoj (kiuj rifuzas pagi sian kotizon kaj emas forlasi la organizajhon) probable ne estas interesataj pri la enkonduko de Esperanto en siajn lernejojn. Pri tio en Esperanto-medioj neniu emas diskuti.

2e: La tasko kaj celo de Esperanto ne estas helpi al la plurlingvismo, sed al la disvastigo de Esperanto. La tasko de la Eo-movado ankaŭ ne estas defendi la lingvan diversecon kaj kuraĝigi al plurlingva edukado. Tiuj taskoj koaj celoj ne konformas al kaj ne kongruas kun la kernaj kompetencoj de la Eo-movado. Do, la Eo-movado povas senti sin ne koncernata de tiaj temoj. Tio ne signifas, ke la Eo-movado ne okupiĝu aŭ ne povos okupiĝi ankaŭ pri tiaj temoj, sed al ĝi simple mankas la kapacito, la rimedoj, la kompetencoj kaj kompetentecoj, la influo kaj la interesiĝo por atingi ion ajn sur tiuj kampoj. **La palavrado pri tiaj temoj en ĝiaj medioj do devas esti konsiderata kiel nura oportunisto por plaĉi al UNESKO, ĉar sincera intereso por trakti tiajn temojn mankas en UEA-cirkloj.**

La definitivon version vd. sub http://www.plansprachen.ch/Esperanto_julio2018.pdf

aK, aug 18 www.planlingvoj.ch

aK, aŭg 18 www.planlingvoj.ch

- Estas totala tragedio kaj katastrofo por Esperanto, ke revuoj kiel "Esperanto" (UEA) trovighas en rusaj, "Kontakto" en brazilaj kaj "Unesco-Kuriero" en chinaj manoj, ĉar en Europo oni ne plu povas trovi redaktorojn aŭ eldonistojn por tiaj revuoj. Chiuj tiuj landoj estas malamike orientataj rilate al la Okcidento. Do, shajne ke UEA atingis sian celon, ke parto de ĝhia agado iris al tiaj landoj, kiuj trovighas sub la regado de diktatoroj kaj kleptokratoj (kiujn UEA ne timas). Kaj neniu e-isto protestas. Sed chu oni povas esti kontenta pri tia solvo? Ne vere. La enhavo de tiuj

presorganoj montras, ke tiuj redaktoroj kaj eldonistoj ne kapablas produkti ion vere interesan kaj legindan. Antaŭ chio mankas kritika traktado de iu ajn temo. Chiun ajn kritikon tiuj redaktoroj timas kiel la diablo evitas la benitan akvon. Nu, bone, che la Unesko-kuriero temas pri nura tradukado de la nacilingvaj eldonoj.

Ankaŭ "Heroldo de Esperanto" riskis malaperi al Brazilo, kie la tiea redaktoro evidentighis totale malkapabla fari interesan revuon (sed la saman problemon havas la svisa eldonisto). Ankaŭ la "Ondo de Esperanto" estas en rusaj manoj (do, bone origine ghi estis ruslanda revuo).

Cetere, kial la redaktoro de "Kontakto" ne povas fari specialan eldonon pri la forbrulinta nacia muzeo en Brazilo? Chi tiu tragika kaj skandala evento (kiu estas dankata al la misedukado kaj misedukado de Brazilo) shokis chiujn homojn, kiuj ech nur rande okupighas pri la kulturoj de Sudameriko.

Sed chu eŭropanoj farus pli bonajn revuojn? Oni povas forte dubi. Se oni legas chiujn tiujn organojn de Landaj kaj Fakaj Asocioj, oni devas konkludi, ke ili estas ech pli malbonaj.

Do, rilate la publican kaj jhurnalisman agadon, la Esperanto-movado trovighas en vere granda krizo, kiu vershajne ech ne plu estos solvebla, char la Eo-movado degeneras pli kaj pli. La tuta stato de tiu publica kaj jhurnalisma agado montras la veran staton de la Esperanto-movado, kiu estas rande de la elcherpigho.

aK, sept. 18 www.planlingvoj.ch

- LA 09.09.2018. NI: JULIA KAJ FILIPPO, HAVOS LA 9-AN JARAN DATREVENON DE NIA GEEDZIĜO. OKAZE DE TIU BELEGA TAGO, MI DEZIRAS KUNMETI UNIKAN KAJ SPECIALAN ALBUMON. POR KREI ĈI TIUN ALBUMON, MI BEZONAS VIAN AFABLAN HELPON.



MIA PETO: BONVOLU SENDI VIAN GEEDZIĜAN FOTON KAJ LA PRECIZAN DATON, KIAM ĜI OKAZIS, KAJ LA LOKON (URBO, LANDO) KIE ĜI OKAZIS. SE VI HONORIGOS MIN KAJ PLENUMOS MIAN PETON, BONVOLU SENDI VIAN FOTON (9x12) AL ADRESO E-MAIL: jjjusi@gmail.com AŬ PER LA POŝTO: JULIA SIGMOND, CASALE VEANO 9. 29020 VIGOLZONE (PC) DANKON!

KARAJ GEAMIKOJ! SE VI NENIAM HAVIS EDZON AŬ EDZINON, MI TREEGE ĜOJUS, SE VI SENDUS LA EDZIĜFOTON DE VIAJ GEPATROJ, SE ĜI NE PERDIĜIS DUM LA MONDMILITO! KUN DANKEMA AMO KAJ AMIKECO MI SALUTAS VIN!

Sigmund Julia

SOKRATO

Interesan libron mi legis. Ĝi aperis en 1999. "LA VERAJ INTERPAROLADOJ DE SOKRATO de HAN RYNER. Mi ege bedaŭras, ke mi ne legis ĝin iomete pli frue, ĉar por mia frato István estis ege grava persono Sokrato, sed ni neniam parolis pri li kaj pri la kialo de lia speciala simpatio.

Bedaŭrinde, mi ne interparolis sufiĉe ankaŭ kun miaj gepatroj, ne nur kun gefratoj. Multaj demandoj restis nerisponditaj. Eble nur kun mia fratino ni diskutis pli multe, ĉar dum ŝiaj lastaj monatoj ni ĉiu vespere diskutis horojn. Ĉion ŝi rakontis al mi, eĉ tion, ke ŝi havas sekreton, kiun ŝi al neniu diris kaj ne diros, kunportos en la tombon. Kaj tute same diris al mi István. Neniam mi ekscios la sekretojn de miaj gefratoj.

La mirinda instruo de Sokrato: obeu al cia konscio kaj menso! Mi pensas, ke miaj gefratoj obeis al siaj konscioj, kaj ili ne volis ŝarĝi mian animon kun la sekretoj! Ne mankis al ili la fido, sed estis granda la amo kontraŭ mi! Dankon, karaj miaj Gefratoj!

KLUĴO

Se iu devas aranĝi multajn aferojn, tiam kvin tagoj ne sufiĉas por ĉio. Estas mirinde, ke mi sukcesis preskaŭ ĉion planitan aranĝi.

Mia baptofilino Rita atendis min ĉe la flughaveno, kvankam mi alvenis kun trihora malfruo, Erika atendis min kun diversaj manĝaĵoj hejme en mia loĝejo.

Miaj genepoj kaj pragenepoj vojaĝis de Sikullando al Kluĵo nur por unu tago, ke ni renkontiĝu. Tiel mi povis ekvidi la tri monatan KAMILLA, kiu estas kvazaŭ porcelan-pupeto.

Miaj gefiloj prokrastis la vojaĝon al ferio, ke ni renkontiĝu. Estis granda feliĉo renkontiĝi kun miaj tre amataj familianoj!

Vendrede mi iris al la banko por preni miajn pensiojn. Poste mi iris al la juvelisto por plilarĝigi mian gefianĉan ringon. Poste mi iris al la Eldonejo por ricevi la librojn "DANKON". Bedaŭrinde mi ricevis nur la duonoN, sed la libro estas belega, danke al la koloraj ilustraĵoj! Mia amiko eldonisto hejmenportis min kaj la librojn. Tage-nokte mi laboris, ke la libroj estu pretaj por enpoŝtigo.

Sabate kun amikino mi iris al la tombejo. Kiel ĉiam, ankaŭ nun mi alportis belan ruĝan rozon al miaj neforgeseblaj gepatroj kaj alian rozon al la tombo de mia frato. Dumvoje hejmen mi vizitis amikinin-ekskoleginon de la Pupteatro.

Dimanĉe antaŭ la diservo mi vizitis mian episkopon, post diservo mian plej inteligentan amikininon. Nemezureble granda ĝojo estis partopreni la diservon en mia preĝejo. Poste mi vizitis alian amikininon, sed jam per taksio mi devis iri, ĉar en la varmego mi estis elĉerpita. Posttagmeze vizitis min unu kuzino.

Lunde mi partoprenis la 69 jaran renkontiĝon post la bakalaŭro. El 81 knabinoj ni ĉeestis ses!!!

Posttagmeze vizitis min esperantista amikino, kaj post ŝi aliaj du kuzinoj feliĉigis min.

Marde alvenis mia helpema kaj grandanima bofratino kaj mi transdonis al ŝi la farindaĵojn. Kiam pretiĝos la libroj, ŝi enpoŝtigos por ĉiuj la libron.

Mi iris kun Rita aranĝi la malnovan telefoneton. Mi havas novan numeron. Bonvolu forgesi la malnovan. La nuntempa estas: 0734 164 555

Posttagmeze mi rigardis ĉe la laptopo de Rita Skotlandon, kie ŝi faris neforgeseblan ekskurson. Tiom mi sukcesis aranĝi dum kvin tagoj.

Merkrede frumatene mi flugis al Italio, kie nia bonkora amiko Eugenio atendis min.

En Veano atendis min Filippo.

FILIPPO

Ĉiuvespere mi povis paroli kun Filippo per skajpo, kie ni ankaŭ vidas unu la alian. Niaj geamikoj dum mia foresto kaj telefonis al li, kaj vizitis lin. Mi estas ege dankema al ili. Por li estis ege malfacile elteni la solecon.

DANKO PREĜO

Mia amikino kaj ŝia filo, por kiuj preĝis multaj el inter vi, karaj geamikoj, nun sendis belan malnovan preĝon. Ŝia beno helpu ankaŭ vin ĉiujn.

Jen la preĝo:

Prakristana beno (4a jarcento)

La Eternulo estus antaŭ vi, por ke Li konduku Vin sur la ĝustan vojon!

La Eternulo estus apud Vi, por ke Li brakumu kaj ŝirmu Vin!

La Eternulo estus post Vi, ke Li gardu Vin kontraŭ insidoj de maliculoj!

La Eternulo estu sub Vi, ke Li kaptu vin, se Vi falos, kaj eliru Vin el la kaptilo!

La Eternulo estu en Vi, por ke Li konsolu Vin, se malĝojo pezas sur Via koro!

La Eternulo estu ĉirkaŭ Vi, por ke Li defendu Vin, se malamiko kuras kontraŭ Vin!

La Eternulo estu super vi, por ke beno venu sur Vin!

Tiel benu Vin la bona Dio!

• VOJAĜOJ KAJ LIBROJ

Al ĉiuj gejunuloj mi proponas, ke ili ŝparu la monon kaj vojaĝu por ekkoni la mondon, ĝis ili kapablas iri kaj memoraĵojn kolekti.

Ne aĉetu juvelojn, persan tapiŝon, pentraĵojn, porcelanojn, NUR foje kelkajn librojn, ke oni havu je la maljuneco kion legi, se jam ne eblas vojaĝi.

Ĉi tiuj du aferoj, la vojaĝoj kaj la libroj estas la plej valoraj -laŭ mia sperto.

Jen la libroj legitaj en aŭgusto:

1. HAN RYNER: LA VERAJ INTERPAROLADOJ DE SOKRATO (1999)
2. COLETTE LLECH-WALTER: EKZISTENCIALISTAJ HEROOJ EN LA LITERATURA VERKARO DE J.P. SARTRE (1958).
- 3.ROLAND PLATTEAU (KOMPILIS KAJ TRADUKIS) EN LA LUMOJ DE EKMIROJ (2018)
- 4.HENRY'T SAS: IRISIS
- 5.JANOS ROZSAS: FAKTOJ PRI GULAG (1997)
6. J.P. SARTRE: LA NAŬZO (1963)
7. BERNARD FRIOT: SALAJRECRETO (2017)
8. HENRYK SIENKIEWICZ: NOVELOJ (1925)
9. HENRYK SIENKIEWICZ: TRA DEZERTOJ KAJ PRAARBARO (1978)
10. DINKO ŜIMUNOVIĈ: ANO DE L'RINGLUDO (1926)

VIVI EN PACO

Tristigan kaj timigan novaĵon legis en la gazeto Filippo. Sur la trajno Milano-Cremona ekparolis en mikrofono virina voĉo: "Ciganoj kaj molestantoj descendu tuj de la trajno." Multaj timigitaj vojaĝantoj forlasis la trajnon. Sola, kuraĝa junulo, Raffaele Ariano protestis ĉe la urbestro. Poste li estis konstante minacata. Lia patrino skribis leteron kaj petis helpon de la ŝtatestro, ĉar ŝi timis, ke oni mortigos ŝian filon.

Multaj diversaj similaj aferoj okazas nuntempe en Italio. Kial ne povas vivi en paco la homoj?

Kial oni ne povas ami unu la alian, se iu estas "alia" ? Ja ni ĉiuj estas terloĝantoj

Mi scias, ke ekzistas multaj homoj, kiuj amas kaj helpas tiujn, kiuj bezonas ies helpon.,

Bedaŭrinde nur la malmulto de la homaro estas helpema!

Ho ve! Kiel tristiga estas la situacio de la homaro en la dudekunua jarcento!

ESPERO

Tamen, ni neniam perdu la esperon!!!!!!!

Salutoj Julia Sigmond

KARAJ ĈIUJ!

- **DANKON**

Eble malrapide, sed ĉiuj legantoj de ĉi tiu letero iam ricevos la 3-an D-libron.

Nome, post “DIALOGO” kaj “DOLORO” alvenos ankaŭ ”DANKON”.

Bedaŭrinde, la poŝto(moŝto) plorinde laboras. Ekzemplo: de Kluĵo al Kluĵo de mi skribita koverto "vojaĝis" tri semajnojn! Nekredeble, ĉu ne ?

Naŭza sento estas la forlasiteco aŭ senprotekteco aŭ sendefendeco.

Kelkfoje okazas, ke oni simple resendas la ekspedaĵon – post kelkaj semanoj! -

al la sendinto. Vana klopodo! Oni ne povas malkutimigi min pri la korespondado.

Mia granda bonŝanco, ke la plimulton de miaj leteroj mi plusendas per komputilo.

Unu “kliko” kaj la letero jam legeblas ĉe la alia flanko de la tergloba, de tiuj, kiuj havas komputilon. Bedaŭrinde, libro nur per poŝto sendeblas.

Do, mi petas paciencon!

- **LINGVO- STILO - FORMO**

Antaŭ pli ol 50 jaroj mi legis unue la libron de dr. Kàlmàn Kalocsay. Sincere, tiam ankoraŭ mi ne sufiĉe bone komprenis, sed nun mi ĝue legis ĝin! Ĉi tiu libro vere estas sensacia. Tre multe mi lernis ĝin legante kaj partojn relegante.

Mi memoras pri mia unua renkontiĝo kun Kàlmàn Kalocsay. Dum la 51. UK en Budapeŝto (1966), mi ĵus renkontiĝis kaj diskutis kun Ferenc Szilàgyi el Svedio, iama ĉefredaktoro de “Norda Prismo”, kiam Kalocsay haltis apud ni, salutis lin, poste li demandis: “Kaj kiu estas la fraŭlino?”. Kiam li eksciis, ke mi estas esperantistino

el Koložsvàr (Kluĵo), li tre afable komencis diskuti kun mi. Post tri-kvar frazoj, ridetante li diris: “Mi konstatas, ke vi bone parolas la lingvon, do ni povas paroli hungare.”

Sekvis kelkminuta babilo inter tri esperantistoj, (el Budapeŝto, Stokholmo, Koložsvàr) dum UK en hungara lingvo.

Post kelkaj jaroj mi vizitis lin, por peti lian helpon. Nome, mi petis, ke li traduku la ok fabelpoemojn de Zsigmond Mòricz al Esperanto, ĉar tiun pupspektaklon ni volis prezenti en Zagrebo ĉe PIF (Pupteatra Internacia Festivalo). Poste oni faris pri nia spektaklo ankaŭ koloran filmon ĉe la televido de Sarajevo kun la titolo “BESTFABELOJ”.

Bela, hazarda okazintaĵo: mi alportis grandan bukedon da margareta-floroj al edzino de Kalocsay. Estis la 8. junio, nomtago de Margareta, kiel ŝi nomiĝis. Tion mi tute ne sciis, sed kiam ŝi diris, ke ĉi tiu floro (lekanto) estas ŝia preferata floro, vere mi ĝojis.

Retroirante al la libro Lingvo Stilo Formo, unu sola afero tristigis min.

Kàlmàn Kalocsay skribis ege gravan opinion kontraŭ la vorto "ci".

Mi citas kelkajn frazojn el la libro:

Zamenhof en iu Lingva Respondo konsilas: <diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur *vi*.>

Sed li permesas la uzon de *ci*, se oni <tre sentas la bezonon>.

Se en iu nacia lingvo oni alparolas la amatan estaĵon per *ci*, oni uzas tiun vorton, kiun oni aŭdis unue de sia patrino, kiun oni uzis parolante kun siaj plej bonaj amikoj, per kio oni alparolas Dion. Amo, intimeco kaj pieco kaŝas sin en la *ci* de la naciaj lingvoj. Sed en la Esperanta *ci* ? Nenio. Ĝi estas seka, nekutima, fremda vorteto.....

La libro aperis en 1931. Mi tute ne scias, ĉu poste li ne ŝanĝis sian opinion ?!

- **STRANGA REAGO**

Miskomprenis iu amikino parton de mia aŭgusta letero (VIVI EN PACO).

Ŝi supozis, ke mi aliĝis al tiuj, kiuj konsentas, ke muzulmanoj mortigu kristanojn.

Mi klarigis al ŝi, ke mi ABSOLUTE ne konsentas pri ĉiuspeca perforto! Ĝuste pro tio mi skribis la pensojn en VIVI EN PACO, ĉar mi dezirus, ke la tuta homaro vivu en paco kaj amo! Bedaŭrinde mi ne povas ŝanĝi en multaj homoj la aĉan senton de malamo al amo, sed almenaŭ en mia eta-sensignifa vivo, ĉiam kaj ĉie mi vivas en amo.

Al la tuta homaro mi ne kapablas instrui ĉi tiun feliĉigan vivmanieron, sed almenaŭ por malmultaj homoj, kun kiuj mi havas rilatojn, mi donas la ekzemplon, ke eblas vivi en amo, eblas pardoni al tiuj, kiuj ofendas min, eblas havi paciencon kun tiuj, kiuj estas malpaciencaj, nome oni povas vivi en paco kaj amo.

Sincere kontenta mi estas, ke mi sukcesis forigi el mia animo la malamon, ke mi atingis tiun spiritan pinton (anima Monteveresto), ke mia amo ĉiam venkas.

Laŭ mi: en la tuta Universo nenio estas pli forta ol la homa amo!

- **MILFOJE PATRO NIA**

Mi preĝis milfoje Patro nia por la sano kaj vivo de Filippo. El mia tuta koro kaj ne kiel preĝmuelilo! Mi kredas en la forto de la preĝo.

- **KROPOTKIN**

Neniam kaj de neniu mi aŭdis mencii lian nomon. Nenie mi legis pri li. Ĝis nun mi eĉ ne sciis, ke ekzistas hungara traduko de liaj libroj, ĉu? (Eĉ pluraj ekzistas!)

Kaj nun esperantlingve mi legis lian libron kun la titolo: "Etiko", Krome ankaŭ lian mallongan biografion kaj ankaŭ lian libron verkitan por la junularo.

Laŭ la kaprico de sorto, kio povas fariĝi ido de rusa aristokrata familio? El paĝio de rusa caro (Nikolao I): faka pensulo, geografo, zoologo, esploristo, ekonomiisto, mondvojaĝanto, anarkisto kaj ne laste verkisto.

El lia 78 vivjaro li pasigis 40 jarojn eksterlande, kiel elmigrinto kaj dum multaj jaroj li vivis en diverslandaj maliberejoj.

Konsterna kaj animskua estis por mi, kion li skribis en lia libro por la junularo, pri la preskaŭ neefektivebla justeco aŭ rajtigateco. Lia alvoko al ĉiuj honestuloj estas: ke ĉies devo estus dumvive batali kontraŭ la maljusto.

Ĉiuj fibroj de mia korpo protestas la penson, ke ververe, sur nia tergloblo pli ofta estas la maljusteco ol la justeco.

Teruriga estas la bildo, ke mi, kiel formiketo, (kune kun multaj-multaj, al mi similaj formikoj), mi dezirus, ke neniu malsatu aŭ malvarmu, sed la enormaj fortaj elefantoj piedpremas nin, ĉar ili ĉiam havas pli ol sufiĉan manĝaĵon, kaj ili neniam frostas.

La voĉon de la tretitaj formiketoj neniam ekaŭdos la grandorelaj surdaj elefantoj.

- EN SEPTEMBRO LEGITAJ LIBROJ

Kalocsay Kàlmàn: Lingvo Stilo Formo (1934)

H. A. Luyken: Stranga heredaĵo

Kropotkin: Etiko

Biografio de Pjotr Aleksejeviĉ Kropotkin

Kropotkin: Por la Junularo

- BONEGE POVAS ESTI

Vivi sen doloroj! HOMO! Vi, kiu ne konas la konstantan, suferigan doloron, provu konsciiĝi pri la feliĉo, kion signifas: vivi sen doloro! KUN AMO MI PENSAS PRI VI ĈIUJ!
Jùlia

- Vi certe audis pri la Oleh Sentsov, tiu ukraina kineisto enkarcerigita en Siberio. Jen kelkaj informoj pri li: **Oleh Sentsov** (ukraine Олég Генна́дійович Сенцо́в), naskita la 13an de julio 1976 en [Simferopolo](#), estas ukraina kineisto, chefe konata pro la filmo *Gaamer* (2011).

Li estis arestita en 2014 de la Federacia Sekureca Servo de la Rusia Federacio (FSB) pro akuzo de

« pretigho al terorista agado » kaj kondamnita je 20 jaroj da karcerigo surbaze de trompa proceso. Li estas nun enkarcerigita en okcidenta Siberio (Labitnangio). Ekde la 14a de maj 2018 li fastostrikas por protesti kontraŭ chiuj politikaj enkarcerigoj de ukrainanoj. Nun lia sanstato malbonas kaj la internacia komunumo, chefe en la kineista medio, forte protestas kontraŭ tiu maljusta enkarcerigo per diversaj subtenaj agadoj kaj peticioj.

Filmo pri lia trompa proceso, the trial, estas videbla je la suba adreso :

<https://www.youtube.com/watch?v=GFOhGYNapj0>

Urghas lin subteni kaj tio estas ankaŭ tasko de IKEL-anoj char Oleh Sentsov engaghighis kontraŭ la anekso de Krimeo. Multaj peticioj cirkulas sur la reto. Sube mi metas kelkajn adresojn de Amnesty International en iuj eŭropaj lingvoj sed multaj aliaj informoj cirkulas pri tiu temo:

<https://www.amnesty.be/je-veŭ-agir/agir-en-ligne/petitions/sentsov>

<https://www.amnesty-international.be/>

<https://www.amnesty.org/en/latest/campaigns/2018/07/oleg-sentsov/>

<https://www.amnesty.org/es/latest/campaigns/2018/07/oleg-sentsov/>

<https://www.amnesty.de/mitmachen/brief-gegen-das-vergessen/oleg-senzow-und-alexandr-kolchenko>

Amike, Nicole

- Eta parenteza detalo: la familia nomo de la ekzilita prezidento de Katalunio estas "Puigdemont" (laŭvorte: monteto-de-monto). Kaj jes: mi konfirmas, ke li frontas 30 jarojn da karcerigo, se li revenas en la hispanan ŝtaton (surbaze de tute elpensitaj akuzoj, kiuj estas senbazaj laŭ la hispania juro, tamen nuntempe la hispania justico tordadas la leĝojn je niveloj, kiuj ŝajnis absolute neimageblaj en lando apartenanta al EU: tio ne rilatas nur al sendependistoj, sed ankaŭ al kantistoj, aktoroj k.a.).
Laŭenhave. Laŭ mi, iom konanta de la aferoj en Rusio, ne tro indas miksi la aferon Sencov kun tiu de la rajto de memdispono de la popoloj. Ke la justico estas ekstreme dependa de la ekzekutiva potenco en Rusio, tio estas pli ol konata afero. Tial leviĝas multaj duboj pri lia proceso, lia kondamno, ktp. Dua afero estas la formo, kiel Krimeo estis aneksita al Rusio. Ŝajnas apenaŭ dubinda partopreno de senuniformaj rusiaj armeanoj, kiuj tutsimple konkeris la duoninsulon kaj poste okazigis ŝajnreferendumon por pravigi la anekson. Tria afero estas, ĉu la plimulto de la loĝantaro efektive bonvenigis la anekson. En tio estas apenaŭ dubinde, ke larĝa plimulto favoris ĝin kaj daŭre kontentas pri tio. Kun granda probleblo, la plimulto de la krimeaj tataroj kontraŭstaris kaj daŭre kontraŭstaras ĝin, same kiel la plimulto de la ukrainoj kaj eĉ parto de la rusoj (Vjaĉeslav bone ekzempligis la aferon per la lokaj esperantistoj). Sed, se konsideri la plimulton de la loĝantaro, estas apenaŭ dubinde, ke, se hodiaŭ okazus plene demokratia referendumo en Krimeo, la partianoj (r)esti en Rusio estus larĝe plimultaj. Sendube eblas kritiki la rusian registaron pri absolute kontraŭleĝa agado, same kiel pri tio, ke ĝiaj ŝajndemokratiaj principoj validas nur kiam tio konvenas al ĝi: ĝi legitimigis sian anekson per rimedo, kiu estas strike malpermesata en Rusio (se iu ekagas por organizi referendumon pri memdispono de rusia regiono aŭ eĉ publike favoras, ke rusia regiono secesiu, inkluzive de Krimeo, tiu frontas karceron). Tamen ĉiuj ĉi kontraŭdiroj apenaŭ ŝajnas zorgigi la rusiajn regantojn. Ili sentas sin la estroj de mondpotenco, sekve arogas al si la rajton esti ne malpli senmoralaj ol ekz. la regantoj de Usono rilate al tio, kion

ili konsideras sia influ-areo aŭ siaj strategiaj interesoj.

Kore, Hektor

Nu vi diris „chiuj popoloj rajtas je memdetermino“ kaj defendis la rezultojn de la kataluna referendumo.

La referendumoj en Krimeo, Sud-Osetio kaj aliaj lokoj do povus esti al vi karaj same, kiel tiu en Katalunio, ĉu ne?

La kataluna referendumo okazis fone de politike stabila situacio en Hispanio, dum tiu en Krimeo — fone de perforta renverso de ŝtata potenco, do estis iusence eĉ pli leĝe pravigebla.

Simile al promesoj de katalunaj aktivuloj, krimeaj porrusiaj agantoj gardas la rajtojn de ĉiuj etnoj.

Eblas plendi, ke estas nesufiĉe da krimetataraj lingvoj, ekzemple, sed ĝenerale neniu speciala premo aŭ malpermeso aperis — fakte Rusio estas certe pli multetna kaj pli federaciema lando, ol Ukrainio, tio jam sekvigis kunlaboron de krimetataraj filologoj kaj ĵurnalistoj kun aliaj respublikoj (i. a. Ĉeĉenio kaj Tatarstano). Estas pozitive solvata la plej grava problemo de krimetataroj: la rajto posedi terpecojn, kiujn ili „akaparis“ en fruaj 1990aj post reveno el Mez-Azio.

Se ni parolas en terminoj de memdetermino kaj la rajtoj de plimulto de loĝantoj solvi sian sorton en decida horo, ni nepre venas al la konkludo, ke krimeanoj kaj sudosetianoj estas subtenindaj.

Bondezire, Иванов Вячеслав Vjaĉeslav

•

Mi sciigas vin ke ne estas hejme pro la grava malsano (Lienmalsano).

Mi suferis dum 5 monatoj sen kuraciloj, finfine oni orientigis min en uganda kuracejo por sperti operacion.

Antaŭhieraŭ, mi spertis operacion kaj hodiaŭ estas surlite. La vundaĵo estas terura.

Esperu ke ĉio iros glate malgraŭ la grava doloro.

Saluton al ĉiuj kunuloj!

Mi ne scias kiam rehejmiĝi ĉe mi en mia lando. Ĉar necesas unue plenumi la sanpagon.

Plej amike!

Honore Sebuĥoro!

• Altestimata s-ana amiko

La 21-an de Oktobro, la Templo de Bona Volo (TBV), la plej vizitata monumento en Braziljo, ĉefurbo de Brazilo, festos sian 29-an fondaĵdatrevenon.

Rilate al tio, jen **filmeto parolata en Esperanto**, kiun la teamanoj de E-fako de Legio de Bona Volo (LBV) zorgeme eldonis por vi. Spektu ĝin kaj per ĝi ricevu nian afablan **inviton**.

Ĝi estas atingebla per tiu ligilo: <https://goo.gl/gpQXLU> Atendante vian respondon, ni elkore deziras al Vi ĉion bonan al Vi! Kun anticipaj dankoj, fratamike, Maria Aparecida da Silva

<https://www.youtube.com/watch?v=e27VVivBw9I> [filmo pri TBV]

•

La Esperanta Vikipedio estas grandparte neutiligebla por seriozaj celoj, ĉar la enhavo estas tro suprajha kaj nekompleta. Oni aŭtomate migras al la angla, germana, franca aŭ rusa versioj por esti pli bone informita. Ĉe la Eo-Vikipedio temas verŝajne pri nenio alia ol pri iom plumpa propaganda rimedo por montri al la homaro, ke Esperanto ekzistas (ankoraŭ).

Andy Kuenzli

• LA INTERNACIAJ LETERTAGOJ – 2018 "VORTO PRI SAMARKANDO: LA URBO

PRI KIU ONI ŜATAS PENSI, SONGĜI KAJ PAROLI"

Karaj amikoj, kolegoj, samideanoj,

Ni ĝojas inviti vin partopreni en nia interkultura tradicia ĉiujara projekto "Vorto pri Samarkando".

Baldaŭ denove venos la signifoplena dato kaj festa okazaĵo por la urbo, pri kiu multegaj loĝantoj de la planedo ŝatas pensi, memori, revii kaj paroli. La 18-a de oktobro – la Tago de Samarkando. La evento, kiu meritas refokusigi nian rigardon je alloga beleco, unika aromo kaj arkitektura dekoro de la urbo, iam nomita la "Perlo de l'Oriento", la "Lando Dezirata de la Koro"... Ĉiuj, kiuj persone spertis la mirindaĵojn de Samarkando en realo, ĉu de malproksime, ĉu estinte tuj apude aŭ eĉ nur en siaj pensoj aŭ sonĝoj, konservis neforviŝeblajn impresojn pri la grandioza historia heredaĵo kaj neordinara nuntempa kulturo de la mondfama urbo.

Kaj ĉiujare venas la Tago, kiam ni esperas, ke almenaŭ por momento, vi transformos viajn pensojn kaj sentojn en ion kreivan por el la fundo de via animo esprimi – naskitajn fare de via koro kaj enstampiĝintajn en via menso – rememorojn pri tiu ĉi speciala loko. Tio estas eblo por dividi viajn travivaĵojn kaj sentojn, por konigi viajn specialajn spertojn kaj tra tiu ĉi transdono denove fari Samarkandon rendevuejo por homoj kaj kulturoj, tradicioj kaj novigoj, por Oriento kaj Okcidento. Ja ĉiam tiel estis en la pasinteco kaj estu tiel ankaŭ en la estonteco!

Eble por iuj, ununura vorto sufiĉos por esprimi tiun ĉi vizion; iuj skribos personan leteron al Samarkando aŭ verkos saluton forme de poemo, kanto, desegnaĵo; aŭ komunikos siajn bondezirojn aŭ sonĝojn por la estonteco de la urbo...

Kompreneble, ĉio dirota kaj verkota pliproksimigos nin unu al la alia, unuigos nin ĉirkaŭ la eternaj valoroj, pliiigos niajn konojn, evoluigos spertojn, plifortigos pacon kaj harmonion – ĉion, kio ebligis al Samarkando atingi la majestecon kaj por ĉiam eniri la historion.

Bonvolu sendi viajn reeĥojn kaj gratulmesaĝojn, laŭeble, ĝis la 10-a de oktobro 2018 al nia retadreso: imps86@yahoo.com, kvankam la materialoj iutempe estos akceptataj ankaŭ post tiu ĉi dato.

La plej interesaj kontribuaĵoj estos publikigitaj en nialanda gazetararo kaj en la venonta eldono de "Konciza Enciklopedio de Eksterlanda Samarkandiana: Kulturo, Unuiganta la Mondon" ktp.


ĈIU ricevita mesaĝo estos danke agnoskita kaj la raporto pri la evento estos sendita al ĈIUJ partoprenantoj.

Atendante vian baldaŭan reeĥon, ni antaŭdankas pro viaj asisto kaj eventuala kunlaboro.

Amikajn bondezirojn el 2760-jara Samarkando, la urbo de Monda Heredaĵo de UNESKO, Anatoli Ionesov Enciklopedia Projekto "Samarkandiana" P.O. Box 76 UZ-140100 Samarkando Respubliko Uzbekistano Retpoŝto: imps86@yahoo.com

P.S. Bonvolu, se eble, plusendi tiun ĉi anoncmesaĝon al viaj amikoj, konatoj, kaj ne nur esperantistaj. Dankon!





Mi jam alvenos hejme post du tagoj da laciga "enŝipado". Nun, mi devas al kutimi ĝi al labora vivo kaj ŝangi biciklo por komputilo.

Dankon por la du etaj renkontiĝoj kaj la informo pri Albanio. Kiel vi povas supozi mi priparolus bonege pri ĝi kaj albananoj, estis tre amuza ferio.

Dum venontaj semajnoj mi klopodos skribi etan texton pri mia vojaĝo, kaj sendos ĝin al vi. David Roman

Dankon, ankaŭ por la reta eldono de "E-o". Mi ja ricevas la paperan revuon, sed kiam ĝi alvenos, mi jam povis tralegi la tutan retan eldonon. Ĉu vi legis la recenzon pri la libro "Zinko"? En Kelmis (iama Neŭtrala Moresneto) estis/as ja nia 3-landa E-o-grupo, kiam mi loĝis en NL. La 16-an la EU-grupo el Bonn veturos al Maastricht kaj Kelmis kaj la kunvojaĝantoj aŭdos iom pri tiu kurioza landeto, tiel influriĉa ankaŭ por E.o.

Mi esperas ke iam baldaŭ ankaŭ aperos artikoloj pri Albanio - vi ja estas tiel laborema!

Kore, Trude Sinno

PS: U. Lins kaj C. Burkert kun familianoj estis en Lisboa kaj iomete rakontis pri la lasta UK.

Mi tre dankas la interesan materialon, mi trastudis ĝin, kaj admiras vin pro la grandega laboro. Mi deziras al vi, kaj via lando sukcesojn!!!

Laŭ mia opinio via lando estas belega, mi gardas en mia animo ! Permesu al maljunulino nur unu kromopinion: via trezoro estas: la pura akvo, kio venas el la montoj! Tio estas pli grava ol la trovita oleo! Vi devus gardi tiun trezoron, ne malpurigi, ĉar tiu donas la estontecon!

Amike Júlia

Niaj amikoj niaj fotoj

Bicikla turo tra Albanio kaj Makedonio

Je 5an de septembro alvenis en Durrës 47 jara esperantisto David Roman el Barcelono. Li intencas bicikladi dum 18 tagoj tra Albanio

Dum tri horoj de posttagmezo mi akompanis lin tra Tirana kaj havis interesan konversacion. Laŭprofesie David estas inĝeniero mekanikista. Sin okupas en propra bizneso riparante motorciklojn. Bonan vojaĝon al li!



David Roman finigis sian biciklan turon tra Albanio kaj parte tra Makedonio Li revenis la 20an de septembro al Tirana

Jacques Tuinder
Eminenta nederlanda esperantisto



En la familio de Zef Mjeda; dankema medalo de prezidento de Albanio

Rakonto de mem Jacques: Kiel mi kontaktiĝis kun Albanio?

La 18-an de decembro 1990 s-ro Zef Mjeda, loĝanta en Shkoder, skribis leteron al s-ino Mila van der Horst-Kolinska, deĵorantino en la Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando. Li skribis:

Estimata Sinjorino Mila,

Tre honte mi skribas al Vi, sed ne trovante alternativon mi ĝenas vin!

Mi ĝenis unufoje s-ron Rašic pri mia malsano.

Mia edzino Anjeze (sesdek ses jarojn aĝa, patrino de du filinoj, ĝis nun tre sana), estas atakita abrupte de 'katarakto' je sia maldektra okulo. Ni konsultis okulkuraciston. Li eksplikis ke operacio estas

farebla sed malfacila.

Mi petas vin, se tio estas ebla, informiĝi ĉe okulkuracisto kaj sciigi min ĉu troviĝas aliaj formoj por elimini la katarakton, t.e. sen operacio? Se tio ekzistas, ĉu estas eble trovi medikamentojn, por elimini la katarakton?

S-ino Mila kontaktis Jacques Tuinder, prezidanton de Agado E3, kun la peto respondi ĉi tiun leteron. Li tion faris kaj reskribis la 22-an de februaro 1991, ke kun granda danko li ricevis koncernan leteron.

Kara amiko, Sekve de via peto mi konsultis nederlandan okuliston, kiu diris ke katarakta operacio en nia lando estas simpla kaj unufoja.

Oni eĉ ne bezonas eniri hospitalon ĉar eblas poliklinika helpo. Por povi pli bone konsideri vian problemon, via okulisto sendu detalan informaron en E-o aŭ unu el la t.n. modernaj lingvoj.

Se via edzino estas helpebla mi invitos vin veni al Nederlando kaj Agado E3 pagos la kostojn. Al vi ambaŭ mi deziras ĉion bonan, esperante baldaŭ aŭdi de vi. Kore salutas Jacques Tuinder.

Sekvis longa korespondado kiu rezultigis en tio, ke - danke ankaŭ al la interveno de la nederlanda ambasadoro en Beogrado! - finfine ges-roj Mjeda ricevis ĉiujn dokumentojn por povi vojaĝi Nederlandon. Zef telegramis la 30-an de januaro 1993:

"La unuan de februaro je la dekseka kaj dek minutoj mi kaj Anjeze forflugos de Tirana al Zurich je la deknaŭa kaj dudekkvin minutoj ni forflugos al Amsterdam Zef".

Tri semajnojn de februaro ili gastis ĉe familio Tuinder en Heemskerk dum kiu restado okazis sukcesa okuloperacio en Heerlen.

Jaron poste Vera kaj Jacques Tuinder faris kune kun grupo viziton al Albanio, kie okazis agrabla renkontiĝo kun Anjeze kaj Zef Mjeda.

Restis amika kontakto kaj sekvis pluraj vizitoj.

Zef tre ŝatus vidi en sia urbo realiĝon de Optika Centro, sed ĉiuj niaj klopodoj kaj forto-streĉoj kondukis finfine al nenio.

Agado E3 - poste Fondaĵo Evidente - instalas tiajn centrojn en Durres, Gramsh kaj Barbullush, sed bedaŭrinde neniu el ili pro diversaj kaŭzoj restis.

Kune kun profesoro pri oftalmologio mi faris rondvojaĝon por konatiĝi kun ĉiuj okulistoj en Albanio, sed pro la terura ĉiuloka korupcio estis ege malfacile pripensi realismajn planojn por la estonteco.

Plurfove mi aranĝis misiojn kun optikistoj al diversaj lokoj de la lando. Al multaj malriĉaj homoj ni servis per laŭreceptaj okulvitroj.

Nia helpo al la Instituto por Vidhandikapitaj Infanoj komenciĝis en 1994 kaj daŭras ĝis hodiaŭ. Nia espero estas granda, ke jam baldaŭ la lernejo povos fari komencon per enkonduko de postelementa instruado.

Nia afabla kaj sindediĉa kontaktpersono, Bardhyl Selimi, dum serio da jaroj sukcese instruis Esperanton sub la tegmento de la lernejo.

Estis por miaj helpantoj kaj ni granda honoro ekkoni, ami kaj estim-egi s-ron Osman Kazazi, kiu estis kvazaŭ la "Albana Mandela". Ni gastis en lia domo, kie li kunloĝis kun siaj fratinoj.

Kaj ĉiam li akompanis nin dum niaj tiamaj laboroj en Tirano kaj ankaŭ ekster la ĉefurbo. Du-foje li vizitis nian landon, ankaŭ por submetiĝi al sukcesa katarakt-operacio.

Kiam ni ekaŭdis pri lia forpaso mi tuj kun kunstarano flugis al Albanio, sed ne plu povis ĉeesti la imponan enterigan ceremonion.

Mi tre ĝojas ke en Albanio mi trovis tiom da bonaj geamikoj. Konklude: ke la ekonomie malforta lando kaj multsuferinta popolo baldaŭ ekvidu 'printempon' en ĉiuj sencoj!

Jacques Tuinbder,

prezidanto de 'Evidente'

- **Niaj esperantistoj**

Zamir Gjurgji, Ĵurnalisto, analisto, poligloto. Diplomiĝis en Svisio (1993) post seminario tie. Ĉi tie li aperas en du tempoj kun sia amata filino.



Informaĵoj

Saluton, Tiu ĉi ĝisdatigo estas sendata al vi sekve de via kontribuo al la retejo verkoj.com. Se vi ne volas ricevi tiajn ĝisdatigojn, bonvolu [informi](#) nin.

Nia nova tuj-tradukilo (kopiu tekston per ctrl-c ekzemple, kaj la traduko aperos tuj) jam entenas 14 lingvojn - la anglan, ĉinan, danan, francan, germanan, hispanan, hungaran, italan, japanan, nederlandan, polan, portugalan, rusan kaj svedan. Oni povas ŝanĝi la nacian lingvon [ĉi tie](#)

Se via nacia lingvo ankoraŭ mankas, kaj vi konas bonan liberan retan vortaron por ĝi, kontaktu [nin](#), por ke ni aldonu tiun vortaron al la tuj-tradukilo.

Ni decidis aldoni al la retejo klasikajn liberajn verkojn, por ke la leganto povu uzi la tuj-tradukilon kaj ĝui la riĉan enhavon de la Esperanta kulturo!

Jen la novaj verkoj en [verkoj.com](#):

- [La infana raso](#) - la klasika poemaro de [William Auld](#)
- [Paŝoj al plena posedo](#) - la klasika lernolibro de [William Auld](#)
- [La vesperto](#) - mikrorakonto de [Maria Nazaré Laroca](#)
- Poemaroj de [Kálmán Kalocsay](#)
- La tuta verkaro de [Claude Piron](#)
- Gustumaĵo el la kajero "[Mia malgranda Esperanto-Gramatiko](#)" de [Peter Weide](#)
- La tuta enhavo de [Eldonejo Inko](#) de Franko Luin - 288 klasikaj elektronikaj Esperanto-libroj.
- [Simpleco](#) - poemo de [Maria Nazaré Laroca](#)
- [Interludo](#) - poemo de [Maria Nazaré Laroca](#)
- [Hastema](#) - poemo de [Maria Nazaré Laroca](#)


Jen la novaj verkoj en [verkoj.com](#):

- [Ses klasikaj rakontoj de O. Henry](#) 06/09/2018.
- Kantado de la kanto [Dua birdo](#) - fare de Israela Becker. Ludado - Doron Modan 06/09/2018
- Nova [Gustumaĵo](#) - [La tria ĉapitro](#) el la nova romano Serenaj matenoj de [Julean Modest](#) - originala krimromano por komencantoj, eldonejo "Libera"
- [Alico en Mirlando](#) - la klasika fantazio de [Lewis Carroll](#) - tradukis [Donald Broadribb](#) 04/09/2018
- [Trans la spegulo kaj kion Alico trovis tie](#) - la klasika fantazio de [Lewis Carroll](#) - tradukis [Donald Broadribb](#) 04/09/2018
- [La vojaĝoj de Doktoro Dolittle](#) - porinfana rakonto de Hugh Lofting - tradukis [Donald Broadribb](#) 04/09/2018
- [Kratilo](#) - filozofia dialogo de [Platono](#) - tradukis [Donald Broadribb](#) 04/09/2018
- [La respubliko](#) - filozofia dialogo de [Platono](#) - tradukis [Donald Broadribb](#) 04/09/2018
- [Eposoj el antikva Ugarito](#) - antikva epopeo, tradukis [Donald Broadribb](#) 04/09/2018
- [Malbeno kara](#) - romano de [Marry Webb](#), Tradukis Grace Kirkwood, redaktis [Donald Broadribb](#) 04/09/2018

- [Venemo kara](#) - romano de [Marry Webb](#), Tradukis Grace Kirkwood, redaktis [Donald Broadribb](#) 04/09/2018
- [Esperanto en la kosmo](#) - Dua Eldono - Scienc-fikcia rakonto de [Klaus Friese](#) ([pdf](#), [epub](#)) 31/08/2018
- [Ekzilo kaj azilo](#) - klasika poemaro de [EMBA](#) (EMeriko BAranjai) 17/08/2018
- Poemoj kaj rakontoj de [Julio Baghy](#) 17/08/2018
- [Poemo](#) de [Merci Kwibe](#) - nova partoprenanto el Afriko 15/08/2018
- [La ĉambro](#) - mikrorakonto de [Maria Nazaré Laroca](#) 15/08/2018
- [Novaj poemoj](#) de [Barry Friedman](#) 14/08/2018
- [For! Duonlumo!](#) - Poemo de Ediberto Pinna Bentes, tradukis Célio Freitas Martins, bildaranĝis [Liette Lêla](#) 10/08/2018
- [Retoj, Balancado kaj Pluvfrapado](#) - Poemetoj de Ediberto Pinna Bentes, tradukis Célio Freitas Martins, bildaranĝis [Liette Lêla](#) 10/08/2018
- [La vesperto](#) - Mikrorakonto de [Maria Nazaré Laroca](#) 04/08/2018

Amike, Amir kaj Eldad

- [Cifereca Mono: Kiel ĝi utilas al ni?](#)



Kelkaj temoj estas tiom popularaj, ke ili ne facile eluziĝas. Tio estas la okazo pri tiu ĉi eldono. Kvazaŭ eĥoj de niaj diskutoj en pasintjaraj numeroj, kiam la ĉefartikoloj pritraktis monon, la temo revenas sur niaj paĝoj, en iom alia formo tamen. Nun la debato koncentriĝas sur virtuala mono. La demando pri cifereca mono estis ne tiom profunda en la pasintjaraj artikoloj. Tiam la plej fama cifereca valuto – Bitmono – ankoraŭ ĝuis statuson de "monero de la estonteco". Nun ĝi estas rigardata iom alie.

La kvanto da elektra energio, kiun postulas la transakcioj kaj "minado" de tiu mono, estas absurde granda. Inter aliaj malavantaĝoj, ĝi nun estas rigardata de kelkaj kiel "monaĉo". Tion asertas Robert Nielsen en artikolo, kiu malgraŭ tio proponas ke Esperantujo havu

propran ciferecan valuton. Aliflanke, Jens Spillner prezentas al ni socimedian retejon, kiu kompanse al popularaj afiŝoj, pagas la aŭtorojn per alia cifereca mono. El ambaŭ kontribuoj eblas havi pli bonan superrigardon pri la nova modo de la cifereca mono kaj kiel ili povus – ĉu nun aŭ estontece – utili al ni.

Nek ciferecan nek realan monon vi bezonas por ekhavi la kartludon Kartoj Kontraŭ Esperantujo. Temas pri libere elŝuteblaj karto, kiujn Tim Morley tradukis kaj disponigis al nia komunumo. Mi ludis ĝin por la unua fojo en la plej lasta IJK en Badaĵozo kaj, ĉar ĝi estas iom polemika, certe mi ne maltrafis la ŝancon intervjui la kulpulon, kiu venigis tiun pekan kartludon en nia "lingvosanktan" amikaron.

Tiun amikaron mi krome ŝatus danki, ĉar multaj el vi dum la ĉi-jara UK kaj IJK parolis al mi pri la revuo. Kelkajn mi konis nur laŭnome antaŭe. Do estis vere ĝojige vidi la vizaĝojn de la homoj, kiuj efektive – per siaj verkaj, raportaj kaj foje tradukaj talentoj – faras tiun ĉi revuon. Pro tiu du-semajna vojaĝo, tiu ĉi numero aperas iom malfrue. Mi devas tamen ankaŭ manifestacii min malfavore al tio, kio estas laŭ mia percepto la sinteno per kiu TEJO kaj UEA rilatas al tiu ĉi revuo.

Miasente, *Kontakto* nuntempe aspektas kvazaŭ filo de divorcintaj gepatroj, kiujn ĝenas la fakto ke ĝi deficitas finance, tamen unu atendas de la alia, ke oni prenu la iniciaton ion fari. La diskutoj pri ĝi ĉiam tuŝas la problemojn kaj la eblaj solvoj estas nur la plej simplaj (ekz. ĉesi presi la paperan version). Ne ekzistas ideoj aŭ plano por reklamado, kaptado de novaj abonantoj k.s. La nurajn ekzemplerojn, kiuj reklamcele troveblis en la kongresoj ĉi-jare, estis mi, kiu kunportis.

Kontakto ne estas mia. Ankaŭ ne de TEJO aŭ UEA simple. Ĝi apartenas al la tutmonda esperantistaro, kaj estas unu el la ĉefaj publikaĵoj – nedubinda elmontrilo de la Esperanta kulturo, kiu dum pli ol duonjarcento aperis seninterrompe. Jes, la gepatroj jam havas siajn proprajn problemojn, sed tio ne povas esti senkulpigo por la malatento, kiu iom post iom povas damaĝi tiun ĉi jam 55-jaran revuon.

- Konkurso en Zagrebo

3-a MEMORIALO "LUCIJA BORČIĆ"

Zagrebo, Kroatio, 12.-15.11.2018

Kadra programo:

lundo, 12-a de novembro

- simpozio "Tradukado de literaturo":
 - prelegoj
- koncerto

mardo, 13-a de novembro

- simpozio "Tradukado de literaturo":
 - prelegoj
- faka vizito
- multlingva poezi-vespero

merkredo, 14-a de novembro

- ronda tablo "Tradukita E-literaturo:
 - ponto inter la kulturoj"
- surmeto de la floroj ĉe la tombo de Lucija Borĉić
- prezento de ŝia verkaro
- proklamo de la rezultoj de la 2-a Internacia traduk-konkurso "Lucija Borĉić"

ĵaŭdo, 15-a de septembro

- vizito al urbo
- vizito al la 41-a Internacia libro-foiro INTERLIBER (Zagreba foiro)

aliĝkotizo: 15 eŭroj

diversaj loĝeblecoj (jam de 15 eŭroj tage)

Aparta avantaĝo por programkontribuantoj!

Organizanto:

Kroata Esperantista Unuiĝo



Informoj:

hes@hes-keu.hr

www.hes-keu.hr

aliĝilo elektronika: goo.gl/TZ9BSq

- Ekde 2016, post interrompo de 15 jaroj, AIS denove okazigas, la konkurson Premio Pirlot, por la plej bonaj sciencaj verkoj. Hodiaŭ, fine de la UK en Lisbono, dum la Scienca Forumo, estis anoncitaj la gajnintoj por 2018..

Temas efektive ne nur pri la jaro 2018, sed pri la lastaj kvin jaroj.

La jughkomisiono (konsistanta el Oprof-j Foessmeier, Maizen kaj Minnaja), ricevis 38 proponojn, de 19 aŭtoroj. Jen la rezultoj:

- Branĉo **libroj**:

- (1) Amri Wandel, la kosmo kaj ni, 3-a eldono (FEL 2017)
- (2) Amri Wandel (red.), Internacia Kongresa Universitato, 70a sesio (UEA 2017)
- (3) Lode van de Velde, Manĝeblaj sovaĝaj plantoj
- Branĉo **artikoloj**: duobla egaleco:
 - (1) Disheng Wang: Simpla Eksplikado pri la kuracado de Multobla Sklerozo (MS) el la vidpunkto de Tradicia Ĉina Medicino (TĈM) (2014)
 - (1) Javier Alcalde: La pacisma aliro (2018)
 - (3) Amri Wandel: Nova horizonto trans Plutono (Ondo de E-o 2018)
 - (3) Christoph Klawe: Pri medicina terminologio en Esperantujo : Recenzo de la Oklingva Medicina Enciklopedia Vortaro (OMEV) de Jozo Marević (2016)
- Branĉo **kursoj**: egaleco:
 - (1) Amri Wandel: Enkonduko al astronomio (Reta, Univ. de E-o)
 - (1) Christer Kiselman: Digita geometrio, matematika morfologio kaj diskreta optimumado (SUS34, Varsovio 2017)
- Branĉo **prelegoj**:
 - (1) Amri Wandel: Nigraj Truoj (Kataluna Kongreso 2017)
 - (2) Francois Lo Jacomo: Primnombroj (IKU 2017)
 - (3) Xavier Alcalde: Solidareca agado pri migrantoj kaj rifuĝantoj en Eŭropa Unio (IKU-AIS 2017)

La diplomoj estos disdonataj dum la inaŭguro de la 35-a SUS en Sanmarino, dum la Itala Kongreso, 19.8.2018.

Artikoloj

- **Scienco, Historio kaj Spiriteco**

La scienca revuo "Explore", eldonata en Amsterdamo, Nederlando, diskonigis gravan esploron de la Centro de Esploroj pri Spiriteco kaj Sano de la Federacia Universitato de Juiz de Fora/MG (NUPES-UFJF), en partnereco kun la Departamento de Psikiatrio de la Universitato de San-Paŭlo (USP).

Reprodução BVReprodução BV

Jair Presente

Temas pri analizo pri dek tri leteroj medieme skribitaj de la mediumo Chico Xavier (1910-2002), atribuataj al Jair Presente, spirita aŭtoro, kiu forpasis en 1974. Ilian enhavon, sekve al la koncernaj kriterioj de analizado, oni konsideris aŭtentika.

La studaĵon subskribis doktoroj Alexandre Caroli Rocha, Denise Paraná, Elizabeth Schmitt

Freire, Francisco Lotufo Neto, sub la orientado de la psikiatro Alexander Moreira-Almeida, direktoro de NUPES-UFJF.

La [retejo disponigas al interretanto resumon](#) pri tiu interesa artikolo, prenita el la eldono de septembro-oktobro/2014.

Tiuj faktoj rememorigas min pri peco de intervjuo, kiun mi donis, en la jaro 2000, al ĵurnalisto Alcione Giacomitti, publikigita de li en la libro "La Pilieroj de Saĝeco en Nova Mondo":

Alcione Giacomitti

En la jardeko post 1980, mi asertis: Scienco, prilumata per Amo, altigas la homon al konkerado de Vero. La filozofia pozicio prenita de la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito fronte al la defioj de universala kono, obeas al prudento: la demando ne estas ĉu kredi, ĉu ne kredi, sed scii, ĉu certa fakto konsistigas aŭ ne absolutan veraĵon. Kaj memkompreneble koncernas Sciencon ĝusta pruvado. Cetere, mi kutimas diri, ke tio, kion Religio intuicie pensas, iam Scienco pruvos en laboratorio. (...) Konvencia scienco (ĉiam) bezonos reaktualiĝon por ensorbi tiujn multajn novajn datumojn kolektitajn de la tiel nomata alta scienco. Tamen, ĝi bezonos ankaŭ inkluzivi inter la novaĵojn la rekonon pri la Spirita Mondo, ne kiel rezulton de cerbaj ĥemiaĵoj, kiuj ekscitus la homan menson en regiono de iluzio, ĉar tia konkludo estas tro elementa. Ĝi devos fari tion kiel plurdimensionian realaĵon, en kiu ekzistas kontinueco de la konscia kaj aktiva vivo de Estulo, en la kampoj ankoraŭ nevideblaj por la vidsentumo. (...)

Iam oni alvenos al tio.

Mary del Priore

Vivian R. Ferreira

Spiriteco, en siaj plej diversaj formoj de manifestiĝo, estas elstara en la brazila historio. Pli bone dirite, neniu lando en la mondo estas for de la atingo de tia influo. Mi konstante asertadas al vi, ke la spirito de religiemo, kio estas alia nomo, kiu same identigas spiritecon, naskiĝas kune kun la homo. Kaj ĝia elvolvado per praktikado de Bono estas ĝusta vojo.

Tiu temo, eĉ se iuj personoj ne emas doni al ĝi la justan fidon, estas ĉiam en la agendo de studemuloj, de esploristoj, de historiistoj, religiuloj kaj de avangardaj sciencistoj.

Antaŭ nelonge, la renoma brazila historiisto Mary del Priore lanĉis la libron "En la alia flanko", per kiu ŝi klopodis priskribi la manieron, kiel niaj antaŭuloj konsideris la mondon de Spiritoj. Laŭ la

resumo de tiu verko, "ĝi estas pensinstiga raporto pri temo, kiu vekas la atenton de tiuj, kiuj kredas ĉion, kaj same de tiuj, kiuj kredas nenion, sed deziras super ĉio koni pli kaj pli la historion de nia lando".

Mian apartan dankon al la kompetenta aŭtoro pro la frata dediĉo, kiun ŝi sendis al mi: "Al la tre kara Paiva Netto, kun admiro kaj brakumo de Mary"

Ne ekzistas estonteco sen junuloj

En Legio de Bona Volo (LBV) ni ne nutras etoson por konflikto inter generacioj. Male: ni kunigas al la trezoro de spertoj de la pli maljunaj la valoran energion de la pli junaj. Kaj la popolo per tio gajnas.



Ni konstante rememorigas la junulojn, ke iam ankaŭ ili havos blankajn harojn. Same frate ni parolas al la grandaĝaj, kaj rememorigas ilin pri tio, ke ili jam estis junaj... Estas tre grave ne forgesi tion...

Morgaŭ ankaŭ junuloj maljuniĝos... Se ili volas konservi la saman spiriton de espero, la saman junecan mienon, malgraŭ la naturaj haŭtsulketoj kaŭzitaĵoj de la tempo kaj malgraŭ la ĉiam belaj blankaj haroj, tiam ili devas praktikadi Bonfaradon. Ne eblas alia vojo. La Spirito plifortigas nian entuziasmon, ĝi donas al ni la eternan belecon de simpatio. Ne ekzistas pli efika kosmetikaĵo ol trankvila konscienco.



Eble tio ŝajnas paradokso. Tamen, lando, kiu rifuzas apogon al siaj maljunuloj ne kredas pri la estonteco de sia junularo. Kio estas nacio, se ne ĝiaj komponantoj? Se estas estonteco, junuloj maljuniĝos. Ili vivos pli longe. Ili emeritiĝos... Strikta elmontrado de tuja momenta ĝuado estas elmontro ankaŭ pri nekredo pri la estonteco. Kaj homoj, kiuj povas, tiuj pensas: “Ni travivu ĉion ajn nunmomente, antaŭ ol ĉio estingiĝos! Kaj kiuj sukcesos tiom rezisti, tiuj damniĝu...”. Ĉi tio ne estas troigo. Oni vidas tion. Oni havas la impreson, ke multaj homoj, kiuj ĝuas junulan energion ignoras la eblecon eĉ atingi la kadukiĝon. Sed ili povos alveni tien... Ne ekzistas estonteco sen junuloj. Ankaŭ ne sen maljunuloj. Junulo estas ĉiu homo, kiu ne perdis la idealon.

- **Intervjuo kun diktatoro Enver Hoxha¹**

(Rakonto pri la vivo, vojo al ŝtatpotenco, ideologio kaj rimedoj, kiuj igis lin, unu el la plej kruelaj diktatoroj de eksaj komunistaj landoj)

La intervjuo estas kompilita de arkitekto Migen Qiraxhi kaj realigita de la organizaĵo "Civitana Rezistado" (Qendresa Qytetare) sponsorita de Fondaĵo Friedrich Ebert.

1

Enver Hoxha (Hodĵa) eksa komunisto albana diktatoro de 1944 ĝis 1985.

La respondoj de la diktatoro Enver Hoxha estas historie veraj.

1

Kiu vi estas? Kial oni honoras vin?

Mi nomiĝas Enver Hoxha kaj mi estas tiu, kiu instalas komunistan reĝimon en Albanio kaj gvidis ĝin dum 40 jaroj per fera mano. Sen mi Albanio riskintus iĝi demokratia lando kaj enviciĝintus en okcidentajn anglo-usonajn landojn.

2

Kia estis via infaneco?

Mi naskiĝis en la urbo de Gjirokastër (Ĝirokaster) kaj pasigis modestan infanecon inter la naskiĝurbo kaj la urbo de Korĉa, kie mi finstudis en liceo.

Mi estis 22-jara, kiam mi revenis al Albanio de Francio, kie mi studis dank' al stipendio donita de la registaro de Reĝo Zog, sed pro malbonaj rezultoj, oni ĉesigis la stipendion kaj mi ne sukcesis finstudi. Jarojn poste, kiam mi kaptis la ŝtatpotencon, mi venĝis min kontraŭ ĉiuj, kiuj ĉesigis miajn universitatajn studojn. Reĝon Ahmet Zog mi persekutis kaj ne permesis al li eniri en Albanion, mi eĉ kondamnis lin al morto je malĉeesto, dum la ministron pri edukado, kiu nuligis mian stipendion, la patrioton Mirash Ivanaj, mi enprizonigis ĝis ties morto.

3

Kion vi malamas plejmulte?

Dion! Komunista materiismo ne povis akcepti religian spiritualismon. Dio kaj religio estis seriozaj problemoj por krei novan homon komunistan, kie centre de ĉio devus estis mi, gvidanto de Albana Komunista Partio, kaj por atingi tion, ni komunistoj, entreprenis ekstremajn rimedojn!

Kun miaj kamaradoj de la partio ni deklaris albanojn laŭleĝe nereligiaj kaj, laŭ la kriminala kodo, kiu ajn mansigne faras krucon aŭ surgenuiĝas por preĝi, eĉ ene de sia hejmo, devis esti kondamnita je ĝis dek jaroj da enprizonigo.

4

Kaj la sorto de religiaj objektoj konstruitaj ĝis tiu periodo, kia ĝi estis?

Dum nia regado ni sukcesis fermi 2169 preĝejojn, moskeojn kaj marabutejojn. Ĉi tiujn objektojn ni redonis al la popolo, transformante ilin je kulturdomoj dekoritaj per portretoj de Markso kaj Lenino, uzante ilin kiel deponejojn, stokejojn kaj prizonojn. Multajn aliajn ni tute detruis.

5

Kio okazis al la estroj de religioj, pastroj kaj mulaoj?

Mi deklaris ilin popolaj malamikoj kaj kunlaborantoj de okupantoj. Sistemece, ekde la jaro 1945, mi estas subskribinta kondamnojn al morto de ekleziuloj, sed estis eksterordinara la rezistado de ĉi tiuj Diaj servantoj!

Pli klerajn kaj edukitajn ni ekzekutis, 40 inter ili estis katolikoj². Miloĵ da muloj kaj pastroj estis enprizonigitaj, dum la ceterulojn, ni senmaskigis publike razante ties barbojn.

6

Ĉu vi estis la fondinto de la Albana Komunista Partio?

En la jaro 1944 dum mia memkritiko en la Kunveno de Berat, mi mencias ke: Koço Tashko estas aktiviginta min en la komunista grupo de Korĉa. Tiutempe mi ne estis membro, sed nur simpatianto.

Dum mia tuta regado mi zorgis, ke ĉiuj partoprenintoj, fondintaj partion, pereu aŭ izoliĝu, por ke neniu povu atesti pri la vero. Mi estu la viziula fondinto de Albana Komunista Partio.

7

Kiamaniere vi fariĝis estro de la partio?

Same en Berat, mi diris, ke mi estis preferita de Miladin Popoviĉ kaj Dushan Mugosha, du jugoslavoĵ, al kiuj mi apogis min, eĉ ankaŭ Albana Komunista Partio, je multaj aspektoj, estis direktata de ili. Pro ties apogo kaj fakto, ke eminentaj figuroj, fondintaj partion, estis konsumitaj pro sia interna milito kaj estante iel edukita en medio de laboristoj, la vojo al direktado de partio malfermiĝis al mi.

8

Kiel vi rememoras la tagon, kiam vi fariĝis ĉefministro?

Mi havis tempon min pretigi, ĉar la deĵoranta ĉefministro, Ibrahim Biĉaku, estis sendinta min leteron je oktobrofino, per kiu li rezignis je posteno kaj invitis min enmaniĝi la registaran oficejon. Tiel mi decidis eniri en Tirana-n la 28-an de novembro 1944 tra la strato de Elbasan, per unu el plej luksaj aŭtiloj tiutempaj, Alfa Porreo, tre rara tipo, posedaĵo de unu el la heredintoj de la familio Toptani. Por ke la eniro estus pli pompa, apud la placo Skenderbej, ni marŝis piede ĝis la hotelo Dajti, dum momento jam fiksita ankaŭ de anglaj kameraoj.

9

Ĉu vi plutenis la postenon de ĉefministro?

2

Kelkajn monatojn antaŭ ol mi okupu oficejon de ĉefministro, mi estis gradigita generalo-kolonelo, kaj krom la posteno de ĉefministro, mi tenis ankaŭ tiun de ministro pri defendo kaj ĉefo de la generala armea stabo. Tiamaniere mi mem kontrolis la ŝtatpotencon enlande.

10

Problemo estas ne nur akiri ŝtatpotencon, sed ankaŭ pluteni ĝin? Kiel vi sukcesis?

Certe. Ni sukcesis pluteni ŝtatpotencon per plej efika metodo: teroro. Tiucele, tuj post kiam mi kaptis la ŝtatpotencon, en la jaro 1945, mi fondis aparaton de Ŝtata Sekureco, strukturo kiu arestis 5021 civitanojn, samjare. Dum ties ekzistado 958 homoj estis mortigitaj sen iu ajn juĝeja decido. Tiu strukturo subpremis ian ajn formon de opozicio enlande kaj persekutadis ĉiun individuon aŭ grupon malakceptintan mian reĝimon.

Ĉiu albano estis registrita kaj tenata sub observado, kie li/ŝi vivis, kie li/ŝi laboris, kiaj estis ties ideoj, ĉu li/ŝi estis kontenta aŭ plendis al ŝtatpotenco. Ni sekvestris riĉaĵojn de riĉuloj, dum konatajn intelektulojn kaj patriotojn, kiuj ne ĉirkaŭbrakis la komunismon, ni persekutis, torturis kaj kondamnis.

11

Ĉu tio estis morala por vi?

Por ni, komunistoj, moralo ne ekzistas. Moralo estas trompaĵo, ilo de burĝaro por pluteni subigita la laboristan klason. Tion ni lernis de la granda Lenin.

12

Ĉu vi estis solaj dum la milito por liberiĝo?

Certe ne. Antaŭ ni, komunistoj delonge rezistadis kaj, per siaj manieroj, strebis al venko en la milito kaj estrado de la lando: Balli Kombëtar (Nacia Fronto), Lëvizja e Legalitetit (Movado por Leĝeco) kaj naciistaj grupoj norde de la lando. Sed ĉiuj-ĉi grupoj konsistis el liberaluloj aŭ intelektuloj kaj tio estis ilia malavantaĝo.

13

Kial albanoj ne unuiĝis por komuna milito?

Ili unuiĝis la 2-an de aŭgusto 1943 en la vilaĝo Mukje, apud Tirana. Balli Kombëtar kaj la Albana Komunista Partio decidis militi ankaŭ por kunigo de ceteraj albanaj teritorioj en eksa Jugoslavio. Sed tia unuiĝo estis malakceptebla kaj kontraŭrevolucia por la Jugoslava Komunista Partio. Tuj kiam oni komunikis tion, mi deklaris la interkonsenton de Mukje nevalida.

14

Ĉu vi klopodis por teni Kosovo-n ene de albana teritorio?

Neniel. Ekde Mukje ni komprenis, ke Kosovo ne devus pluesti en nia tagordo. Kelkajn jarojn pli poste, en Kunveno de la Centra Komitato de la Partio, decembre 1946, pri la afero de Kosovo mi deklaris:

Tio ne estas progresema laboro farenda, male, ni devas fari plejeblon por certigi, ke kosovanoj interfratiĝu kun jugoslavo.

15

Dum viaj lastaj vivjaroj³ vi turnis atenton al Kosovo. Kial?

Ne nur al Kosovo, sed al ĉiuj elementoj certigantaj por mi bildon de patrioto. Patriotismo estas la sola karto restinta, kiam mankas aliancanoj kaj subteno, kiun ili havigis al mi por teni la ŝtatpotencon.

Mi sukcesis. Multaj albanoj hodiaŭ opinias vere, ke mi estis patrioto.

16

Kaj multaj aprecas vin pro konstruado de Albanio.

Per fera mano kaj perforte ni sendis prizonulojn en tendarojn de deviga laboro. Senpage kaj perforte ili konstruis grandajn verkojn enlande, kiel digojn, kanalojn, fabrikojn, uzinojn, flughavenojn, hospitalojn, agrofarmojn kaj loĝblokojn. Ni montris nin senkompataj kun ili, kiuj konstruis la landon per sia sango.

(sekvas longa nomlisto de 30 tiaj grandaj verkoj)

17

Kiamaniere prizonuloj povis konstrui la landon?

Malamikoj de la popolo kaj la partio kondamniĝis kaj enprizoniĝis. Albanio pleniĝis je 23 prizonoj kaj 48 prizonoj-tendaroj de deviga laboro. Tie ĉiuj kondamnitoj laboris en la plej malfacilaj sektoroj.

18

Kial dum via reĝimo albanoj izoliĝis?

En la komunista Albanio ĉio povintus endormiĝi, sed ne la landlimo. Nur perfiduloj volis eliri el Albanio, ĉar ili ne volis konstrui la socialismon, nian sanktan celon. Tiel, iu ajn perfidulo,

3

transvidinta la landlimon, estis kondamnenda kaj ekzekutenda. Ĉirkaŭ 6000 albanoj estis ekzekutitaj ĉe la landlimo provante fuĝi. Eĉ ankaŭ tiuj, kiuj spektis per siaj TV fremdajn kanalojn estis kondamnitaj kiel perfiduloj de la popolo.

19

Kio okazis al la privataj proprietaĵoj?

Ni purigis la landon disde la ekspluatanta klaso konsistanta ĉefe el grandaj terposedantoj. La vorto "privata propraĵo" apartenas al sistemo burĝa- reviziisma. Nia komunismo konstruiĝis surbaze de kolektiva propraĵo. Ĝis la jaro 1976 ĉiuj proprietuloj seniĝis je ĉio, sen ia ajn rekompenco, kaj la tuta riĉaĵo (laborilaro, brutaro kaj proktuktejoj) iĝis entute ŝtata propraĵo. Tio eblis ankaŭ per teroro kaj operacoj policaj kaj armeaj, kiuj sufokis la rezistadon de la loĝantaro, kiu ne transdonis volonte al la ŝtato sian propraĵon.

20

Lasta demando: Kiel vi eksplikas, ke eĉ plimulto de viaj kamaradoj estis samsevere punitaj de via reĝimo?

Unu el konsiloj de Miladin Popoviĉ estis: Partio plifortiĝas netigante sin, eĉ tiam kiam ne estas malamikoj, vi devas inventi ilin.

Homoj ĉirkaŭantaj min, familioj loĝintaj apud mi en la Bloko⁴ daŭre ŝanĝiĝis pro netigo. Dum 40 jaroj mi vivigis kampanjojn de netigoj, kiuj punis kaj ekzekutis albanojn, ne nur ene de la partio, sed ankaŭ en aliaj sektoroj. El mia registaro estas ekzekutitaj 9 ministroj. En la armeo nur en la jaro 1974 estas ekzekutita la ĉefo de la stabo, mia eksa milita kamarado kaj punitaj 500 oficiroj.

En la jaro 1975 estis arestitaj la ĉefaj estroj de la landa ekonomio kaj ties familioj estis internigitaj. Sed netigoj okazis ankaŭ en la sektoro de la kulturo. Menciindas la arestitoj post la 11-a Kanzona Festivalo en 1973.

La 16an de februaro 1984 mi estis trafita de apopleksio kaj fakte, ekde tiam, mi apenaŭ povis estri. Adorita kiel Dio, mi forpasis la 11-an de aprilo 1985. Per murdoj, perforto, teroro kaj izoligo mi sukcesis domini plene mian popolon dum 40 jaroj!


Esperantigis Bardhyl Selimi, la 23-an de septembro 2018 (Finredaktis Edmon E. Ludwig)

4

Ilustraĵoj







neluesi largpamës i Partisë Komuniste Shqiptare.



procep...
nëve. Por, që hyrja të ishte sa me trimërore...
Skënderbej marshuam më këmbë deri pranë Hotel Dajti
ky i fiksuar edhe nga kamerat angleze. ”



erdnes...
y ishte disavantazhi i tyre. ”



nuk e lejova të
madje e dënova
mungesë, ndër
me ndërpreu t
plak Mirash
në vdekje. ”

“
P
P
T



- **ANTAŭ 50 JAROJ ARMEOJ DE LA VARSOVIA PAKTO INVADIS ĈEĤOSLOVAKION POR DISBATI LA "PRAGAN PRINTEMPON"**

La Esperanto-gazetaro silentis, krom *Paco*, la organo de Moskvo. La embarasa *Paco*-artikolo de 1968 kiam en aŭgusto 1968 okazis la invado ka okupado de Ĉeĥoslovakio fare de armeoj de la Varsovia Pakto, la sovetia eldono de la Esperanto revuo *Paco* tute ne prisilentis ĉi tiun eventon; male, ĝi eĉ traktis ĝin, kvankam laŭ propra maniero el moskva vidpunkto. En artikolo sub la dubinda titolo 'Luktante por la homaj rajtoj' e-isto Evgenij Bokarjov, tiam kun la oficiala funkcio de prezidanto de la komisiono pri internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj, rajtis verki la ĉefartikolon de tiu eldono de *Paco*. "Komplikaj okazintaĵoj, kolizioj, konfliktoj markis la pasintajn monatojn de la jaro 1968" li skribis, por atentigi, ke en


la kvindek unua jaro post la Granda Oktobra Socialisma Revolucio Unuiĝintaj Nacioj deklaris ĝin Jaro de la homaj rajtoj. Vide al la giganta lezado de la homaj rajtoj pro kaj sekve al tiu 'revolucio' en Sovetunio, la komparo ne povintus esti pli cinika, opinias almenaŭ mi mem. Por deflankiĝi de la tragedio en Ĉeĥoslovakio, la polemiko de Pacodirektis sin unuavice kontraŭ vico da membroŝtatoj de tiu mondorganizaĵo, kiu "daŭrigas sian barbaran invadon" en Vjetnamio, sed ankaŭ en "la multsuferanta Greklando", kie "furiigas la militema faŝista diktaturo de la 'nigraj koloneloj'". Plue: "En FRG aspiras ekposedi regpovon novfaŝismo, kaj la 'eksterordinaraj' leĝoj subfosas la formalajn 'liberojn', kiujn oni proklamis en la okcidentgermana konstitucio." "Kaj en Hispanio, kie ĝus okazis la 53a Universala Kongreso de Esperanto, jam kelkajn jardekojn regas la reĝimo, seniginta la laborulon de la plej fundamentaj rajtoj...". Krome, "la rasista registaro de Sud-Afrika Respubliko estas pelinta trans pikdraton de la rezervejoj milionojn da loĝantoj;" "Ameriko, la ŝtato, kiu tiel reklamas sian 'liberecon' – Usono, kies trupoj tretas nun la tutan mondon, minacante per atako al ĉiuj, kiuj kuraĝas batali por sia nacia sendependeco, – tiu ŝtato montras ekzemplojn de ekstermo de la rajtoj, enskribitaj en la Deklaracio." La agreso de la Varsovia Pakto kontraŭ Ĉeĥoslovakio estis pravigita kiel (mem)defendo kontraŭ la "intrigoj de la imperiismo kontraŭ la socialismaj landoj". Estis promesite, ke "la trupoj de la uniaj landoj, provizore enirintaj la teritorion de Ĉeĥoslovakio, ne miksiĝos en la internajn aferojn de Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko". Ne necesas komenti ĉi tie la absurdecon kaj mensogan karakteron de tiuj asertoj, pri kiuj nuntempe ĝenerale regas historia klareco, eĉ en Ruslando. Kompreneble, pri la (mizerega) situacio en la sovetia bloko mem mankis ajna komento en *Paco*; anstataŭ tio estis aldonita la frazo, ke "en 1917, kiam unuafoje en la historio la laboristoj, soldatoj kaj kamparanoj de Rusio sub gvido de la komunista partio komencis realigi en la vivo siajn homajn rajtojn." Eĉ la "agantoj de la esperanta movado, kiuj deklaras sin 'neŭtralaj' kaj 'elstarantaj ekster politiko', kiuj ne deziras rimarki la agresan politikon de imperiismo", estis eksplicite "kondamnitaj". La revuo *Esperanto* estis akuzita, ke ĝi faras "malverajn kaj malĝustajn elpaŝojn" kaj "falsigas la veran vizaĝon de la organo de UEA". Poste sekvis frazo pri la "gloraj dekretoj de Lenin", kiuj "estas efektiviĝitaj en nia lando, konstruanta nun komunisman socion".

El http://www.planlingvoj.ch/Recenzoj_diversaj.pdf, p. 37.


Tiel la rusoj siatempe mensogis, kaj ili daŭre mensogas ankaŭ nun.


Beletraĵoj

- Kelkaj artikoloj el Almanako Lorenz 2018, enalbanigitaj



1





Historia e Biblës

E vlerësuar si bërthama e të gjitha traditave fetare të popullit hebre, nga të krishterët si "zbulim hyjnor", e respektuar nga myslimanët si një tregim për jetën e gjithë profetëve para Muhametit, fakt i vërtetë dhe tërheqës është se Bibla është teksti më i rëndësishëm dhe më me shumë ndikim i qytetërimit perëndimor.

Pikërisht, për këtë arsye, është të paktën një kureshti të vësh re se sa pak dinë njerëzit për prejardhjen dhe ndërtimin e këtij libri, që citohet çdo çast dhe përsëritet (disa herë) papagallçe. Përkundër kësaj, pak njerëz e dinë se si u bë kjo vepër e tillë, sikurse është tani, dhe, mbase, ende më pak e dinë faktin që historia e këtij libri shtrihet mbi çështje gjuhësore.

Po përshkruaj vetëm gjurmën e rrugës historike të librit në fjalë.

Marrim, së pari, titullin: Bibl;a. Kjo fjalë vjen nga greqishtja taV Bibliva - "librat". Kjo na zbulon se libri që ne e marrim si një e tërë është një bashkësi e madhe librash, të krijuar përgjatë 1600 viteve, nga autorë të ndryshëm dhe në gjuhë të ndryshme. Këta libra ndahen, siç dihet, në dy grupe të mëdha:

Testamenti i Vjetër, që grumbullon tekste të ndryshme të hebrenjëve dhe çifutëve

dhe Testamenti i Ri, që bën fjalë për jetën e Jezuit dhe veprimtarinë e ithtarëve të tij.

Megjithatë, ndërsa kjo ndarje është e vetëqartë, e duhur, madje, e përshtatshme për lexuesin në përgjithësi, vendimi për cilat libra flitet se i përbëjnë ato ka qenë temë për debate të rëndësishme dhe për luftra.

Kjo ndodh sepse, përveç librave kanonikë (ato që i përkasin Biblës) ka, në të dy Testamentet, një korpus të madh tekstesh, ku vlefshmëria fetare ka ngjallur gjithnjë mosbesime serioze. Këta libra kanë marrë epitete të ndryshme, që varionin nga "ato të pa frymëzuara nga Zoti" në "ato që janë qartësisht të rreme" dhe "vepër e drejt". Ato njihen nën emrin e përgjithshëm "libra apokrifë".

Pra korpusi i përgjithshëm i teksteve biblike ndahet në: kanonet, ato që janë në Shkrimet e Shenjta dhe në veprat apokrifë, ato që nuk janë. Megjithatë, ndër librat kanonikë ka një nënbashkësi tekstesh, që nga ana e vet, pranohen nga katolikët (ortodoksë dhe romanë) po jo nga protestantët. Këto vepra njihen si "libra gjysmëkanonikë". Sidoqoftë, ta nisim nga linja kohore, nga Testamenti i Vjetër.

Tekstet që njihen me këtë emër janë krijuar gjatë një periudhë tepër të gjatë historike : e para pas eksodit de hebrejëve në Egjipt, nga Moisiu (sikurse për traditë mendojnë se ka ndodhur në shekullin 13 para Krishtit) dhe e dyta pas kthimit të çifutëve të marrë robër nga Babilonia.

Gjatë periudhës para Krishtit disa tekste të ndryshme të pangjashme u përdorën nga hebrejtë dhe çifutët si mjete të mënçurisë dhe këshillimit. Është e qartë se ndër ato libra **Ligji**-pesë librat që tradicionalisht i vishen Moisiut, që flasin për krijimin e botës deri në momentin kur hebrejtë erdhën në Kanaan, të prirë nga Moisiu vetë- zinin gjithnjë një vend të shkallës së parë. Pastaj, ai i përdori tetë librat e **Profetëve**, të krijuara midis luftërave për pushtimin e Tokës së Premtuar dhe shkatërrimi i Jeruzalemit nga babilonasit (viti 609 para Krishtit) dhe, në shkallë të tretë, **Shkrimet**, numri i të cilave varion sipas shkollës biblike.

Në vitin 537 para Krishtit, mbreti Ciro, i persëve, i lejoi çifutët ta braktisin Babiloninë, të kthehen në vendin e vet dhe ta rindërtojnë tempullin e vet. Në atë moment, Nehemja, ministri i mbretit dhe një prift çifut, ringre fenë çifute mbi baza të reja, krijon një kod të ri fetar (**Readmono**, që do i vishet Moisiut), riharton të gjithë tekstet dhe ndalon përdorimin fetar të atyre, që nuk kanë lidhje të drejtpërdrejtë me popullin dhe historinë hebreje. (Që atëhere, librat që u vishen Hanoû dhe Noas, më të vjetra se ato Moisiane, u hoqën, dhe madje nuk u bënë pjesë e koleksionit hebre të teksteve të shenjta, kështu ato u bënë "apokrifet" e para të korpusit biblik).

Gjatë 500 viteve, ndërmjet Nehemjes dhe Krishtit, numri i Shkrimeve u rrit, sepse tekstet e reja, për jetën më të re të çifutëve ose për profetët që eksperimentuan pas asaj kohe, iu shtuan atyre.

Sidoqoftë, ndonëse nuk ishte më ndalimi për t'u kthyer në tokën e çifutëve, kjo nuk do të thotë se atje u kthyen të gjithë: shumë bashkësi çifute u përhapën në shumë qytete të Lindjes së Mesme, ku pak a shumë, u integruan në jetën e fiseve të tjera. Kështu, gjatë shekullit të dytë para Krishtit, bashkësia çifute më e madhe jetonte në Aleksandri, një qytet ku mbreti Ptoleme, i Dyti, kërkoi nga shtatëdhjetë priftërinj çifutë (rabinë) që t'i kthejnë në greqisht tekstet fetare, që t'i ketë edhe ato në bibliotekën e tij të famshme. Ky version grek i teksteve, u bë koleksioni i parë i plotë i librave që ekzistojnë deri tani, i njohur me emrin latin **Septuaginta**, për nder të shtatëdhjetë dijetarëve që i përkthyen 24 librat që e përbëjnë atë.

Po pse 24, në se disa thonë 46? Në se "bibla" çifute ka vetëm 24 tekste, ku janë 22 të tjerat? Dallimi i parë është se të krishterët i ndajnë librat, të cilat çifutët i konsiderojnë si një tekst i vetëm. Kështu, midis **Profetëve**, librat e Samuelit dhe **Mbretërit** paraqiten dy e nga dy para të krishterëve.. Ndarja më e rëndësishme është ajo e librit "të 12 profetëve", të cilët në versionet e krishtera ndahen sipas autorësisë. Në këtë mënyrë, tetë librat çifutë të profetëve bëhej 22 libra të krishterëve. E njëjta ndarje bëhet midis **Shkrimeve**: Kronika dhe libri i Ezras dhe i Nehemjas janë paraqitur si katër tekste të ndryshme.

Kaq ndarje rezultojnë që në 39 tekstet (që megjithë ndarjen e pangjashme, përputhen me ato që përdoren nga çifutët) por mungojnë ende shtatë që të vimë në numrin 46! Për ta sqaruar atë, na duhet të kthehemi te historia.

Nga shekulli i dytë para Krishtit deri në shkatërrimin e Jeruzalemit dhe dëbimin e çifutëve nëpër tërë perandorinë romake, që e bënë romakët në vitin 70 pas Krishtit, Septuaginta në gjuhën greke dhe tekstet në hebraisht që përdoren në Palestinë kanë bashkëjetuar mirë, kryesisht sepse ato përputheshin në atë që ishte vërtet e rëndësishme për të gjithë: **Ligji** dhe **Profetët**. Sidoqoftë, në mbarim të shekullit të tretë, pra pas diasporës çifute dhe gjithashtu për shkak të garës me sektin e ri të krishterë, rabinët farisej u mblodhën në qytetin **Jamnia** dhe e ribënë përzgjedhjen e teksteve, që duhet të përmbushnin 4 kritere:

të jenë në ujdi me tekstet moisiene,

të krijuara në Palestinë,

maksimumi deri në kohën e Neëmjes

dhe në hebraisht.

Kjo do të thotë që kriteri gjuhësor ka qene përfundimtar për të vendosur, se cilat tekste kanë qenë "të frymëzuar nga Zoti" dhe cilat jo. Dhe, me qenë se në Septuaginta kanë qenë shtatë libra dhe pjesë të disa librave, që nuk i binden njërit nga këta kritere- sidomos të fundit- ato u hoqën nga koleksioni i dytë i teksteve të shenjta çifute. Megjithatë, me qenë se të krishterët e parë përdornin greqishten, ato edhe më pas u bazuan në Septuagintën si burim i dijes për besimin çifut. Janë pra këto shtatë libra, të shtuara te 39 librat e përmendur, që formojnë Testamentin e Vjetër prej 46 librash që përdoret nga katolikët.

Gjatë tre shekujve të parë të Krishtëritit u krijuan tekste të ndryshme që u visheshin, herë ithtarëve të Jezuit, herë ithtarëve të vetë (Luka dhe Marku janë shembujt më të mirë). Kështu, gjatë këtyre shekujve ishte e zakonshme të dëgjoje për evangjeli sipas Filipit, Jakobit, Maria Magdalenës, Judasit dhe të tjerëve.

Letrat e të njëjtit Filip të Bartolomeut dhe ithtarëve të tjerë, si dhe tregimet për lindjen dhe fëmijërinë e Maries, të Jezuit, për jetën dhe vdekjen etj gjithashtu ishin të përbshkëta dhe të njohura për shumë të krishterë të shekullit të dytë, ashtu sikurse Apokalipsi (Fundi i Botës) sipas Petros. Ka gjithashtu një numër të madh tregimesh dhe legjendash për jetën e Pilatit, i cili, thuhet se u bë i krishterë dhe dëshmor në fund të jetës së vet..

